



glyn roberts

**ĉu ni vere helpas
la trian mondon?**

Cercle espérantiste de l'Agenais
"Laùte!" * F 47340 Laroque Timbaut
1984 * 10 FF

— SAT —
broŝurservo

Tiu ĉi broŝuro estas la 126-a eldonita de SAT-Broŝurservo.

Multaj el la antaŭaj estas elĉerpitaj aŭ elĉerpiĝantaj.

Ĉiujare aperas pluraj novaj kajeroj. Se vi deziras ricevi senmanke ĉiujn novaĵojn kaj mendi el la jam aperintaj eldonaĵoj, plej bona solvo por vi estas fariĝi **broŝurabonanto**.

Kontraŭ minimume 100-franka provizo vi ricevos aŭtomate ĉiujn novajn broŝurojn kun 20% da rabato + la dumonataĵ bultenon **Laito!**, ĝis elĉerpiĝo de via monprovizo. Per 100 FF via abono validos proksimume 2 jarojn.

Adreso : Cercle amical espérantiste de l'Agenais

F 47340 LAROQUE TIMBAUT

Poŝtkonto : 3371 74 M Bordeaux (sama adreso)

Kelkaj el la jam aperintaj broŝuroj :

Verkoj de E. Lanti

Verkoj de Valo

Verkoj de Han Riner

Kiel diri...? (Lentaigne)

Argentina novelaro

Esperanto en 24 paĝoj

(angla, franca, hispana, itala, kataluna)

Por ekologia socio (Murray Bookchin)

Etiko I (Kropotkin)

Jaro 2000 (Henri Muller)

Lingvaj anguloj (Baronnet)

Memvola servuto (La Boétie)

Mia vivo (Bartelmes)

Naciismo kaj esperantismo (Aarse)

Unu aŭ nul (Guy Marchand)

El verkoj de Leo Tolstoj

Kio estas SAT? (Masson)

Inter sovetaĵoj popoloj (Diksztejn)

Nia individuismo (E. Armand)

Katastrofplano pri Fessenheim

Antropogenezo (Pannekoek)

Bazoj de anarkiismo (Balkanski)

La racia kaj ateista budhismo

Abrégé de la grammaire esperanto

Esperanto or english? (Masson)

Tekstoj de Krishnamurti

Elektio de tekstoj de Bakunin

ktp...

glyn roberts

**ĉu ni vere helpas
la trian mondon?**

Esperantigis :
Gaïta Robert

Cercle espérantiste de l'Agenais
"LaÛte!" * F 47340 Laroque Timbaut
1984

ENKONDUKO

1.1 Kredeble iam ekdubas ĉiu persono, kiu foriris helpi en subevoluinta lando.

La demandoj povas aperi frue, foje ekde la prepar-periodo, aŭ dum la unuaj laborsemajnoj. Povas okazi, ke ili leviĝas multe pli malfrue post monatoj aŭ jaroj da komisiita tasko. Eĉ malgraŭ la laŭdoj de vizitanta ministro, la raporto de la gazetaro, la gratuloj de la oficialaj instancoj... tiam ĝuste en la sukcesa momento ĝena penso prezentiĝas: Ĉu ni vere helpas la popolon de tiu lando ? Ĉu niaj teknikoj reale alportis progreson ? Ĉu tio estas disvolvado ?

1.2 Por dubi ne necesas esti laborinta sur la grundo de malproksima Afriko. Se vi kolektas helpmonon por UNICEF aŭ OXFAM, se vi laboras ĉe organizo, kiu sendas volontulojn, aŭ ĉe programo por teknika asistado, vi ankaŭ povas deziri certigon, ke la helpaĵo sendita malproksimen reale estigas evoluon. Ĉu vi publike esprimu tiujn dubojn, tio estas alia afero. La organizoj povas toleri privatan kritikon pri ia aŭ alia projekto, sed insistas, por ke la tuta bonfaro ĉe subevoluintaj landoj restu ekster ia ajn diskuto.

1.3 Ĉar fakte abundas la kialoj por ne dubi :

a) "La malriĉuloj en la mondo - malsanaj, ne edukitaj - tiel evidente suferas pro manko, la plej malgrava donacaĵo povas nutri iun kompatindulon. Tial ju pli ni donacas, des pli ni helpas."

b) "Ni ne malkuraĝigu la donacemulojn de la riĉaj landoj komprenigante al ili, ke iliaj donacoj ne bonefikas. La energiokrizo jam akriĝis la publikan opinion kontraŭ la Tria Mondo ; ni ja ne malplibonigu la aferon."

c) "La registaroj de la pli malriĉaj landoj insiste petas la plimulton el niaj helpoprogramoj, kaj ili, certe pli ol iu ajn, kapablas prijuĝi ilian valoron." Sed la plej forta argumento por ne dubi pri la valoro de nia helpo eble estas jena :

ĉ) "Se ni kritikis la teknologion kaj la instituciojn eksportatajn de ni je la nomo de progreso, ni riskas levi dubon pri la bazo kaj valoroj mem de nia

propra socio. Kaj nur Dio scias, kien tio povus konduki nin !"

- 1.4 Eĉ briditaj, la duboj multobligas. Ili subite reaperas je la vido de deketaĝa aŭtoparkejo en Kampala, de Hinda klasanaro ludanta la "Song'o'n dum somera nokto", de virino nutranta ekster iu kliniko sian baldaŭ mortontan infanon per akveca miksaĵo de Ovomaltine, de ministro sidanta en sia blanka Mercedes por inspekti agrikulturan projekton... En tiaj momentoj al kiu nin turni ? Al kiuj modeloj? Kiel mezuri Bonon aŭ Malbonon faritajn nome de "helpo al evoluo" ?
- 1.5 Tiu ĉi libreto estas verkita por tiuj, kiuj intencas pasigi unu-du jarojn en iu lando de Afriko, Azio aŭ Latina Ameriko. Sed ĉiu persono iam pripensinta la "Mision de Blankulo", kiu estigas pacon kaj prosperon tra la tuta mondo, povas trovi ĉi tie novan prilumon sur malnovaj problemoj.
Mi persone scias, ke post ĉiu el miaj kvar vizitoj en Afriko kaj sur pli foraj terenoj mia propra idearo ŝanĝiĝis. Ekzemple, nun rigardante fotojn pri mia unua restado, mi ruĝiĝas pro miaj tiamaj nescio kaj nesentemeco. Kiel malbone preparita mi estis, koncerne valorojn kaj perspektivon, por helpi Afrikon en ĝia evoluo ; plie, kiel nekonscia pri tio.
- 1.6 Tiu ĉi libreto ja ne celas respondi ĉiujn demandojn. Absolute ne. Sed ĝi prezentas kelkajn ideojn povantajn utili al kiu sin demandas pri la ŝanĝoj, al kiuj li kontribuas. Por akceptigi tiujn ideojn ni devas klare akordiĝi pri la signifo de "evoluo". Ĝi paradokse estas io neniam pristudita de multaj personoj okupiĝintaj pri ĝi. Malgraŭ jaroj en la Helpmedio ili ĉiam estis tro okupataj pri sia tasko por cerbumi pri la tuta afero. Ankaŭ subevoluo estas io laŭ ili tiel evidenta, ke ili ne sentas neceson esplori profunde ĝian signifon.
Se tio aspektas al vi malvera, nur demandu iun profesion aŭ amatoran helpanton, kiel li komprenas tiujn terminojn kaj juĝu mem pri la kvalito de la ricevitaj respondoj.
- 1.7 Fine prezentas avantaĝon la ekzerco, kiun mi proponas sur la sekvantaj paĝoj : ekzameni evoluon laŭ potenco-vidpunkto ebligas al ni profundan

esploron pri la kaŭzoj de malriĉeco en niaj propraj landoj.

Ni povas malkovri, ke la diferencoj tradicie notitaj inter evoluintaj kaj subevoluintaj nacioj estas malpli gravaj ol la similaĵoj.

RAKONTO

Antaŭ ĉio, jen rakonto. Ĝi fontas el realo, same kiel la aliaj venontaj ekzemploj.

"Alvenis ekspertoj en fiŝkaptista vilaĝo. Dum jaroj la indiĝenoj uzis primitivajn teknikojn por labori. Vere, ili kaptis fiŝojn, sed ili devis ĉiutage pagaji malproksimen sur la maro, eble eĉ dum la festotagoj. Peniga vivo, eĉ por delonge harditaj homoj.

Pli ol la malnovaj kostis la novaj retoj ; ankaŭ la kaptometodo estis malsama. Sed per ununura retpleno ili kaptis provizon por tuta semajno. Mirinde! Oni povus labori unu tagon semajne kaj esti libera dum la ceteraj! La popolo en la vilaĝo organizis grandan feston, plurajn festojn... fakte tiom da festoj, ke la homoj estis devigataj fiŝkapti du tagojn semajne por pagi la plezurkostojn.

"Malbone!" opiniis la ekspertoj. "Ili devus fiŝkapti ses tagojn semajne por gajni monon maksimume. Ni venis ĉi tien ne por ĉeesti senfinan amuzadon. Certe sufiĉas unu festo ĉiumonate. Temas pri subevoluinta lando ; ili produktu pli da proteinoj. Ili fiŝkaptu! Sed la vilaĝo ŝatis festojn. Fiŝkapti du tagojn, esti libera la ceteron de la semajno.

Incitiĝis la ekspertoj. Ili venis de malproksima nordo ne por rigardi la indiĝenojn tamburi, danci kaj revii. Ili venis plenigi malsatajn stomakojn, por malgravigi la minacon de la subnutritoj kontraŭ la supernutritoj. Tamen la vilaĝanoj daŭre dancis ĝis malfrua horo dumnokte. Kial ili ne dancus ? Ili tiam estis riĉaj, preskaŭ tiel riĉaj, kiel la Maharaĝo, kiu tamen neniam laboris, eĉ unu tagon, dum sia vivo...

Tiam la Projektestro havis genian ideon. (Ne senutile li antaŭe sekvis vesperan kurson pri ekonomiko.) Tiuj mallaboremaj fiŝkaptistoj estis ne veraj mallabor-emuloj : mankis al ili nur **motivo** por pli penige labori. Ili ankoraŭ ne konsciis pri siaj bezonoj.

Li subaĉetis vilaĝanon, por ke tiu ĉi akiru motorciklon.

Korupto estas abomeninda, sed foje necesa. Evidente ne ekzistis vojoj, sed la malseka sablo laŭlonge de akvobordo estis malmola kaj ebena...

La motorcikla ir- kaj revene zumegis. Kia ludilo! Ĉiu junulo baldaŭ deziris posedi sian propran. La maljunaj vilaĝanoj avertis ilin : "Pri kio utilas iri kaj reveni sur la sablo?"

Sed la junuloj replikis : "Ni povas konkursi. Ni vidos, kiu iras plej rapide. Kaj vi, la grizbarbuloj, vi povos veti pri ni!"

La ideo de la Projektestro vere brile sukcesis. La viroj fine fiŝkaptis preskaŭ ĉiutage. La ĉefurbo ricevis la bezonatan kvanton da fiŝaĵo. (Granda parto nun verdire estas transformata en fiŝfarunon kaj eksportata al Eŭropo, kie ĝi konsistigas bonegan nutraĵon por porkoj kaj ebligas konservi malalta la ŝinkoprezon.) Sed la plej favorata el ĉiuj probable estis la maharaĝo, ĉar li tiel fariĝis la ekskluziva agento de la motorcikla firmo en la lando. Li sola mastris ankaŭ la ĉefan fiŝkomercon en la urbo, dum la familio de lia onklo konstruigis kaj estris la fiŝfarunan fabrikon. Post forflugado de la ekspertoj al sia hejmo, li altigis la prezon tiel, ke por aĉeti unu motorciklon viro devas labori tri jarojn anstataŭ unu sezonon.

Kaj la fiŝistoj daŭre fiŝkaptas. Ili malkovris al si bezonon."

El tiu mallonga rakonto almenaŭ unu konkludo klare aperas : ŝanĝiĝo ne ĉiam signifas progreson.

MODERNIGO, KRESKADO kaj aliaj terminoj

3.1 Nu, kio estas disvolvado? Ĉu ĉio **nova** signifas disvolvadon? - novaj hospitaloj, novaj vojoj, mirakla rizo kiu ebligas gravajn rikoltojn, elektraĵ dentobrosoj, napalmo, bakteriaj militoj... kaj se ne, kial ne ?

Aŭ estas tro krude atendi rektan respondon jes/ne pri iu ajn el tiuj ekzemploj ; ĉu ili nur **parte** koncernas disvolvadon? Aŭ eble disvolvado en iaj cirkonstancoj, sed ne en aliaj?

Iu maniero pristudi tiun difinoproblemon estas ĝin analizi laŭ alia vidpunkto kaj vidi, kio disvolvado **ne estas**.

3.2 Tio utilas, ĉar oni nun uzas multajn malsamajn vortojn por priskribi la ŝanĝojn, kiuj okazas en la tuta mondo. Vi aŭdas pri **modernigo**, **ekonomia kreskado**, **socia ŝanĝo**, kaj eĉ pri **civilizado**, kvazaŭ tiuj ĉi estus sciencaj kaj fidindaj procezoj ĝenerale komprenataj kaj agnoskataj. Plie vi aŭdos ilin, kvazaŭ ili samsignifus kiel la vorto **disvolvado**, kio malveras.

3.3 Tiu lingva malprecizeco ofte rivelas ne nur supraĵan pensmanieron, sed ankaŭ bazan sintenon, laŭ kio estas **ni** la modernuloj avangardaj, civilizitaj kaj disvolviĝintaj. Nia historio de la grekoj ĝis ni estas monda historio. Niaj konceptoj pri la mondo estas veraj, ĉar ili faris nin kiaj ni hodiaŭ estas. Pro tio niaj ideoj anstataŭ la **iliajn**, malaktualajn, neefikajn, erarajn.

Laŭdire dank'al tempo kaj pacienco "ili lernos esti kiel ni ; kvankam estus pli bone por ili ne tro rapidi, ĉar ili fakte malfruas je jarcentoj."

3.4 Nu, ni ekzameni kelkajn el tiuj terminoj.

La rakonto pri la fiŝista vilaĝo certe montras kelkajn ekzemplojn de **modernigo**. Tiu vorto kutime subkomprenigas, ke tiaj ŝanĝoj ŝajnas pli efikaj, pli produktivaj. La uzado de nilonretoj, ekzemple. La nova teknologio ofte (sed ne ĉiam) estas pli komplika ol la malnova kaj preskaŭ ĉiam bazita sur fosilia energio (karbo, gaso, petrolo). Tio ĉi signifas pli grandan dependecon rilate al ĥemia kaj metala industrioj.

Aliaj tipaj aspektoj de modernigo estas : pli rapida ritmo koncerne laboron kaj komunikadon, kreskanta graveco de la urboj, pli disvastigita reto de komercaj rilatoj kaj pli da cirkulanta mono, kiu (kune kun la horloĝtempo) fariĝas mezurilo por taksi la homvaloron.

Tiuj ŝanĝoj okazis kaj ankoraŭ okazas en nia "moderna" socio por la plejbono kaj la plejmalbono tiel en okcidento, kiel en popol-demokratiaj landoj de orienta Eŭropo. Ankaŭ Ĉinio estas allogata de la potenco kaj potencialeco ligataj al multaj modernigaj procezoj, kvankam kun kelkaj rezervoj. Neniu nacio povas ignori la necesecon de raciaj procedoj, de efikaj metodoj por produkti (aŭ detru) , de pli rapidaj komunikrimedoj ktp.

Sed io racia morgaŭ eble ne plu estos tia. Ŝajnas racie al la brita polico meti en komputeron la registro-detalojn de ĉiuj aŭtomobiloj en la lando por plej rapide identigi la ŝtelistajn veturilojn. La kostoj por prizorgi tiun komputeron estos tre altaj, kvankam malgravaj kompare al la aliaj sociaj kostoj de privata aŭtomobilo. Ĉiamaniere komputeri estas moderne. Ĉu vere ? Ĉu ne estos eĉ pli moderne, pli racie organizi bonan sistemon kun publikaj transportrimedoj kaj bicikloj ?

3.5 Estus stulte malakcepti sciencan kaj efikecon. Ĥemia sterko certe pliigos la rikoltojn ; estas vere, ke morfino haltigos la suferon, ke transporto per kontenero estas pli rapida, pli pura, pli sekura - sed ni memoru pri du faktoj :

a) preskaŭ ĉiuj hodiaŭaj modernaĵoj altgrade dependas de fosilia energio, kontrolata de kelkaj nacioj kaj multnaciaj kompanioj.

b) io racia ne ĉiam estas saĝa. Homoj estas nur homoj. La raciigado okazanta en la riĉaj kaj malriĉaj landoj, eĉ se ĝi ŝanĝas kelkajn formojn de malegaleco, estigas bedaŭrindan emon koncentri la potencon en la manoj de la "fortuloj".

Modernigo sekve ŝajnas prezenti bonan kaj malbonan flankojn ; sed ni akordiĝu almenaŭ pri tio : pli da racieco kaj pli da efikeco sole ne sufiĉas. Disvolvado entenas ion kroman.

3.6 La rakonto ankaŭ sugestas, ke **ekonomia kreskado** okazis dank'al plia produktado de fiŝaĵoj. Oni ofte konfuzas kun "disvolvado" alian terminon, "kreskado", kiu bezonas pli profundan analizon. Novaj retoj certe estis aĉetitaj, pli da fiŝoj kaptitaj, transportitaj al la urbo kaj venditaj. Tiam motorcikloj estis importitaj kaj venditaj al la fiŝista popolo, sendube estigante multajn akcidentojn kaj la bezonon pri bandaĵoj kaj medikamentoj. Kaj ni ne forgesu la ekspertojn mem, eĉ se malmultaj, sed kun grava aĉetpovo. Ili bezonas frostoŝrankojn, transportilojn, loĝejojn, servistojn, eŭropan nutr- kaj trinkaĵojn, plonĝekipaĵon por laboro kaj plezuro, kaj multon alian.

Ĉiu el tiuj operacioj (aĉeto kaj vendo, importo kaj eksporto) aldoniĝas en la jaraj statistikoj de **Brutta Nacia Produktado**, kiu mezuras la ekonomian

kreskadon.

La BNP-statistikoj koncerne kreskadon povas signifi bonan rezultaton por ekonomikisto aŭ por maharaĝo, sed indikas al ni nenion pri la kvalito de la vivo en fiŝista vilaĝo de la Tria Mondo.

3.7 **Socia ŝanĝo** estas alia termino ofte uzata por sugesti progreson. Socia ŝanĝo okazas en ĉiuj homgrupoj. La anaro kreskas aŭ malkreskas ; la proporcio inter junuloj kaj maljunuloj varias same kiel iliaj rilatoj. El la rakonto ni konkludas, ke la viroj pli junaj fariĝas pli influhavaj ; ŝanĝo okazas koncerne la labor-horojn kaj -tagojn. Novaj "bezonoj", novaj valoroj kaj statusaj simboloj sin ŝovas en la kulturon. Tiuj estas ĉiuj sociaj kaj psikologiaj ŝanĝoj, sed ili per si mem ne konsistigas **disvolvado**. Ni memoru, ke sociaj ŝanĝoj okazis ekzemple en Hiroŝimo kaj en Song Mai.

3.8 En iun socion enkonduku specimenon de moderna teknologio - ĝi estu horloĝo, antibiotiko, fusilo - kaj vi estigos tutan serion da ŝanĝoj. Ili miksiĝos kaj influos unu la alian tiel kondukante al sociaj, psikologiaj kaj ekonomiaj konsekvencoj.

Kelkaj daŭros mallonge, aliaj estos neinvertigeblaj; kelkaj estigos feliĉon kaj aliaj katastrofon. Oni emus diri, ke iu ajn frenezulo povas okazigi ŝanĝon.

3.9 **Disvolvado** estas io alia. Ĝi postulas longatempan vidkapablon. Ĝi eble malpli koncernas la ŝanĝojn fakte okazantajn ol la dezirindajn. Disvolvado oni povas koncepti nur interne de ideologia kadro; ĉar disvolvado koncernas justicon, egalecon kaj demokration. Ĝi neniam povos limiĝi je strikte mezureblaj kvantoj - elspezitaj dolaroj, konsumitaj proteinoj, produktita elektro por unu persono dum unu jaro.

3.10 **Modernigo** : bone - sed kiu teknologio taŭgas? Laŭ kiu ordo ĝi estu aplikata? Je kiu ritmo?

Ekonomia kreskado : konsentite - sed en kiu sektoro kaj je kioma kosto por la komunumo?

Socia ŝanĝo : tre bone - sed kiu bezonas ŝanĝon? Vi? Mi? Kio valoras, aŭ ne? Kion ni konservu? Kiu decidas?

Disvolvado : jes, sed por kiu ?

3.11 Tiuj estas ne signifikaj retorikaj demandoj, sed esencaj problemoj tute ne solvitaj de la "avangarda"

mondo ĉe si mem.

Dume pripensemaj Afrik-, Azi- kaj Latinamerikanoj estas ege sentemaj rilate tiujn problemojn kaj konscias, ke ili rajtas pridemandi volontulojn, misiistojn, teknikistojn laborantajn en ilia lando: "Kial vi pensas, ke ni bezonas vin por solvi niajn problemojn?"

"El kiu ideologia bazo fontas via agado en nia komunumo?"

DU VIDPUNKTOJ PRI SUBEVOLUO

4.1 Ni ne protestu, ke ni ne havas ideologian bazon por labori. Ni ja havas. Neniu pensas nek agas absolute sendepende. Pli ĝuste ni memstariĝante pensas laŭ veraj ŝablonoj pri la naturo de homo kaj de mondo, pri bono kaj malbono, pri kaŭzo kaj efiko.

Tiuj ŝablonoj kompreneble varias de iu grupo al alia ; ili povas konduki al troa simpligo, al fermitaj spiritoj, sed ili povas ankaŭ ebligi komprenon kaj komunikon.

Por iu persono foriranta helpi en subevoluinta lando ne sufiĉas pensi : "Mi iras, ĉar ili estas malsanaj kaj malsataj..." kvankam tio povas esti admirinda sinteno. Li (aŭ ŝi) iam certe demandos al si : "Kial ili malsanas kaj malsatas?"

Lia (aŭ ŝia) respondo estos produkto de lia (aŭ ŝia) ideologio.

4.2 Oni ĝenerale proponas du ĉefajn klarigojn pri subevoluo kaj kun ili du strategiojn al progreso. Ni nomu ilin la **liberala** kaj la **socialista** vidpunktoj*.

A. La liberala vidpunkto

☞ La evoluantaj landoj urĝe petis sendependecon inter 1950 kaj 1960 antaŭ ol esti sufiĉe maturaj por mem prizorgi proprajn aferojn. Nun ili estas katenitaj en senelireja cirklo pro troa loĝantaro, malsato kaj malsano kaŭzataj de nekompetenta administrado (koruptado, neefikeco), superstiĉaj

* En la limigita spaco de tiu libreto mi povas nur skizi la ĉefajn liniojn de tiuj du kontraŭaj vidpunktoj. La citiloj substrekas, ke ili estas ege koncizigitaj versioj de multe pli subtilaj filozofioj.

kredoj de la popolamaso (rezisto al uzo de kontraŭ-koncipaj rimedoj, rifuzo de la hindoĵ mangi bovaĵoj), plus ĝenerala manko de tekniko, de labordisciplino kaj de entreprenemo.

Niaj kolonioj

La plejmulto de la personoj en Britio refutus la raporton de Geoffrey Barker je la nomo de OXFAM ("The News", la 2an de januaro), laŭ kiu niaj ekskolonioj estis forlasitaj en malbonaj ekonomiaj kondiĉoj.

Ni ne forlasis ilin. Ili mem elektis eliri el la Imperio, inside influataj de komunismo, kiu promesis al ili liberecon.

Libereco, al kiu ili kredis pro cerboŝtopado, estis utopio.

Ĉu estis tiel urĝa bezono, kiel nun, pri almozdonaĵ institucioj, kiam tiuj kolonioj apartenis al nia imperio aŭ al "Commonwealth"? OXFAM faras bonan laboron - kie okazas veraj ruiniĝoj (ekzemple en Bengladesho) aŭ uraganoj, inundoj, tertremoj - sed se niaj ekskolonioj ne estus elektintaj forlasi nian familion de nacioj, ili nun ne estus submetitaj al nekompetentaj diktatoretoj sub la jugo de ties komunistaj subtenantoj.

En la letero de S-ro Barker la esencaj vortoj estas : "La almozdonaĵ organizoj ŝajne investas saĝe." Ŝajno tiel ofte elreĝigas.

R.J. Lucerne Avenue, Waterlooville

Letero publikigita en "The News", Portsmouth, 1974-01-07

Nenio nova en tiuj mizeraj vivkondiĉoj, ĉar tiuj landoj eltenis similan mizeron dum jarcentoj, batalante inter triboj [memoru Tchombé (Combe) kaj Lumumba], suferante malsategon, nesciante pri propraj riĉofontoj.

Sekve de tio nun mankas al ili du esencaj elementoj por disvolviĝi :

- kapitalo kaj financaj rezervoj,
- teknika sperto.

4.3 Feliĉe la evoluinta mondo ankoraŭ konsentas helpi la pli malriĉajn landojn per financaj investoj kaj teknika asistado. La landoj ligitaj al la Eŭropa Merkato jam profitas de konsiderindaj avantaĝoj. Ankaŭ la Monda Banko kaj aliaj similaj organizoj pretas asisti, se ne ĉiujn malriĉajn landojn, almenaŭ tiujn, kiuj planas nasklimigon kaj ne minacas naciigi la fremdajn investojn.

4.4 Ni riproĉu neniun pro subevoluo. Anstataŭe, ni estu pozitivaj. Jaron post jaro multaj landoj rapide progresas ekonomie alproksimiĝante al ekfluga

punkto. Meksikio ekzemple, kaj eble Turkio. Japanio sukcesis, eble pagante certan prezon pro polucio. Aliaj landoj povas sekvi.

4.5 Disvolvad-strategio estas jena :

Plibonigi la **komunikadon** kun la evoluinta mondo; konstrui ter- kaj fervojojn, mar- kaj flughavenojn; meĥanizi kaj modernigi la produktadon de materialoj plej oportune elektitaj laŭ la lokaj eblecoj : ligno, teo, kafo, kuproerco; kaj eksporti al industriaj landoj por enspezi fortajn devizojn.

La pli kompetentaj por prijuĝi la valoron de investo koncerne disvolvadon kompreneble estas la privataj entreprenoj, ĉar tiuj samaj entreprenoj devos en Eŭropo kaj Nordameriko rafini la krudmaterialojn, ilin vendi kaj trovi monon por pagi la evoluantaj landojn.

Pro la sama kialo la fabrikoj en malplej evoluantaj landoj, same kiel la plantejoj kaj hotelĉenoj ofte apartenas al fremdaj akciuloj, kiuj ne nur venigas fortajn devizojn sed ankaŭ kreas labor- kaj trejneblecon por la manlaboristaro.

4.6 Laŭ la liberala vidpunkto oni fidu al edukado, al ebleco esti novajn sintenojn. Tiu ekspansio de modernaj ideoj okazas ne nur en lernejoj kaj fabrikoj sed defluas de ekstere dank'al filmoj, revuoj, radioelsendoj kaj reklamanoncoj. La indiĝeno subkonscie identiĝas kun la herooj de aŭdvidaj komunikiloj; li volas vestiĝi same, kiel ili vestiĝas; stiri similan "Mercedes" aŭ almenaŭ "Lambretta"; trinki similan "Martini". Sed por tion fari li unue ekproduktu - ne bebojn, sed laboron. Li bezonas ekiri antaŭen por atingi la mezajn sociklasojn rimarkindajn pro siaj stabileco kaj modereco.

4.7 La instigo influas individuon pli ol grupon. La motivigon al sukceso sub dungiteco favoras la ekzamsistemo en lernejoj kaj la labor-malcerteco en privataj firmoj (kontraste kun la absoluta sekureco burokrata en naciigitaj organizoj). En multaj landoj tiuj valoroj estas krome favorataj de la kristana etiko (individua peko kaj savo), kaj de la varoj mem individue akireblaj en butikoj.

4.8 La **liberala vidpunkto** pri disvolvado do logike originas el la **liberala vidpunkto** pri subevoluo. Ambaŭ havas radikojn en ideologio bazita sur

nordamerika kaj okcidenteŭropa koncepto pri demokratio. Tia demokratio protektas kaj favoras unuarange la individuan liberecon por iri antaŭen kaj akiri riĉaĵon.

La celo estas komforteca stato, en kiu la homoj laŭnature malfortaj kaj ne konkurkapablaj estos je certa grado protektataj de (kaj en) diversaj institucioj. ”

4.9 B. La socialista vidpunkto

“ Subevoluo ne estas pasiva stato, sed aktiva procezo. Dum kvar jarcentoj la kolonioj pro siaj riĉofontoj estis ekspluatitaj de la landoj, kiuj nun taksas sin "evoluintaj" kaj tiu procezo hodiaŭ plu daŭras. Krome subevoluo estas konstata ne nur en la tielnomata Tria Mondo, sed ankaŭ en kelkaj partoj de "evoluintaj" landoj - vidu la malriĉecon de Skotlando, Bretonio, Tennessee (Teneseo), kaj la vastajn kadukiĝintajn kvartalojn en la ŝtatoj. Malsato, malklereco, kronika malsano, senlaboreco estas logikaj sekvoj de konkurado en ekonomia sistemo, en kiu la ŝtatoj ĉiamaniere malfavoru la plej malfortajn. Tiuj ne estas kaŭzoj, sed simptomoj de subevoluo : neeviteblaj kromproduktoj de kapitalismo.


4.10 Sin turnante al historio la socialista vidpunkto reliefigas ke, en Azio, Afriko kaj Latinameriko ekzistis altnivelaj kulturoj kaj civilizacioj ĝis la 16a jarcento, sed ili estis detruitaj dum la sekvantaj jarcentoj, kaj tiuj teritorioj fariĝis malproksimaj kolonioj surranda de la "civilizita" mondo, kies centro tiam estis okcidenta Eŭropo, kaj nun estas Usono.

Por la ideo, ke ili estus malriĉaj, multaj laŭdire malriĉaj landoj posedas gravajn riĉofontojn, sed tiuj ĉi (malgraŭ sendependeco) restas regataj de potencaj kompanioj okcidentaj, kiuj aŭ rekte posedas ilin, aŭ profitas de ili dank'al favoraj aranĝoj komercaj, impostaj ktp...

4.11 La fluado de la riĉaĵoj, laŭ la socialista vidpunkto, ekiras de la simpla farmisto, ministo aŭ kampara laboristo interne de la subevoluinta lando, pere de fervojo aŭ kamiono, ĝis la ĉefurbo aŭ la haveno. Tie malgranda parto de la produktvaloro estas

depremita kaj iras kiel altaj salajroj, amortizoj al la "elito" de la loĝantaro, kiu ĝuas eŭropan vivnivelon.

FIGURO 1a



Sed la reala produktvaloro foriras trans la oceanojn al potencaj centroj industriaj. Tie la krudmaterialoj estas prilaborataj kaj de tie al la monda komerco iras la fabrikitaj produktoj.

Tiu sistemo kompreneble havigas laboron kaj relative altajn salajrojn al multnombraj laboristoj en okcidento, kio plej evidente kaj abunde manifestiĝas per posedo de veturiloj, domoj kaj kolortelevidoj. Tamen, kvankam la industria popolamaso partoprenas en tiu parazita prospero, for de ni la ideo, ke ĝi maksimume gajnas el tiu sistemo.

4.12 La veraj profitantoj de tio estas la estroj kaj ĉefaj akciuloj de gravaj kompanioj. Multaj el tiuj ĉi nun estas **multnaciaj**, kio signifas ekster la kontrolo de iu ajn aparta lando. Dank'al grandegaj rezervoj de kapitalo kaj ekspertaro ili venas al plejparta monopoligo de la okcidenta ekonomio. Dum jaroj **petrolo** estis klasika ekzemplo. Tiel, ke iuj povis aserti: "la okcidenta civilizacio daŭros ne pli longe, ol la petrolregado fare de okcidento". Ĉesigu la petrolfluan kaj nia tiel laŭdata civilizacio

kolapsos samnokte. Kiel ajn estu, nekontestebla fakto estas, ke Esso, Gulf and Shell pligrandigis sian profiton je 35 ĝis 60% en 1973 kompare kun 1972. Tiom da riĉaĵo amasigita tuj kreas urĝan zorgon : kiel reinvesti tiun kapitalon, tiel ke ĝi produktu maksimuman profiton? Se neniu naciigo tie antaŭvideblas, la kompanio ofte elektas subevoluintan landon. Ĝi investos eble en hidroelektran barajon, en alumini-fandejon, en esploradon pri marfundaj ercobuloj, en minejojn... Fine, tiel kompletigas la subevoluo-cirklo.

Instigataj ne de disvolvado-urĝeco, sed de profitemo, la estroj de tiuj kompanioj plej altnivele influas en la medioj politika, administra, militista, jura kaj aŭdvidila...

- 4.13 Tiele prilumita, subevoluo ne plu aspektas kiel serio de akcidentoj kaj malfeliĉaĵoj kaŭzitaj nur de hazardo.

Ĝi estas procezo bazita sur kaŭzo kaj efiko, sur transmetado de riĉaĵo kaj potenco. Procezo ĉesigebla kaj inversigebla.

Por ke okazu vera disvolvado laŭ tiu ĉi vidpunkto la strukturo skizita en la figuro 1. estu detruita. Tio signifas la ekziston de potencaj grupoj kontraŭaj same en evoluintaj landoj kiel en subevoluintaj. La riĉaĵo amasigita, per kiu ili sin protektas, estu forŝirita el la manoj de la akciuloj, direktoroj, ĉefteknikistoj, bankistoj, advokatoj, generaloj... kaj redistribuita al la popolamaso, kiu estas la unua kaj plej grava riĉofonto de ĉiu lando.

- 4.14 Sed kiel kaj kiam tio ekestos, ni ne povas antaŭscii.

Ĝi estas procezo, kiu laŭdifine fontu el la interno de ĉiu lando kaj el la bazo. Kelkajn informojn havigas al ni la eksperimentoj en Ĉinio, Kubo, Vjetnamio, Koreio kaj, laŭ aparta maniero, Tanzanio. Ankaŭ Ĉilio iom progresis dank'al sia Prezidento Allende antaŭ ol fali unufoje pli sub la jugon de militistoj kaj de multnaciaj kompanioj.

Jen grandlinie kio aspektas komuna al la strategioj de tiuj landoj :

a) nova ideo pri demokratio, en kiu la individuan liberon limigas la nepraj bezonoj de grupa bonstato; en kiu la diskutoj kaj decidoj pri urĝaj bezonoj por disvolvado okazas en la kadro de ununura

partio politika; kaj kie la celo de la partio estas krei kooperan homgrupon socialistan. En tiu socio virinoj kaj viroj havas egalajn rajtojn, devojn kaj ŝancojn. Strikta bonmoreco estas deviga; korupto severe punata.

b) naciigo de la ĉefaj produktrimedoj enlandaj (industrioj, bankoj, komunikiloj) kun aparta zorgo pri kooperativa agrikulturo laŭ planoj longdaŭraj. Ĉar la okcidentaj landoj normale rompas la rilatojn je tiu stadio ofte per embargo sur helpo kaj komerco, la komerco kun la Tria Mondo kaj la komunistaj landoj tendencas al kreskado.

c) celo al plena dungiteco (viroj kaj virinoj) ne nur por kreskigi la produktadon, sed ankaŭ kiel rimedo por socia kontrolo, por distribuado de riĉaĵoj (salajroj) kaj mobilizado de energio por nacia defendo.

ĉ) unuaranga estu la laboro utila al la komunumo: fabrikado de necesaj - sed ne luksaj - artikloj; ĉie, kie eblas, politiko de memsufiĉo por eviti dependecon de iu ajn fremdlando. Reinvesto de la profito en lokan produkton kaj en utilajn servojn sociajn, inkluzive de publika transportado.

d) distribuado de kelkaj bazaj produktoj : rizo, loĝejoj, pura akvo, elektro, al la tuta popolo, eble porciumitaj, sed ofte sub la kosto de fabrikado.

e) nova koncepto pri edukado, laŭ kiu la manlaboristoj studas (ekz. masivaj kampanjoj por kulturo kaj alfabetigo) kaj la universitatanoj laboras permane. La celo : edukado ne por individua brilo sed je la servo de la komuna bono.

f) volo ekde la komenco plibonigi la vivnivelon de la ordinara popolo, unue ĉe kiuj plej bezonas, kun speciala prizorgo al infanoj kaj al kiuj multe produktas per sia laboro.

Resume : Ĉiu produktu laŭeble; ĉiu ricevu laŭbezone.

Jen do la **socialista vidpunkto** pri subevoluo kaj pri la strategioj necesaj al progreso.

- 4.15 Ekzistas ankaŭ aliaj ideologioj, ekzemple religioj, kiuj provas ekspliki malriĉecon, kiel rezulton de homa peko kaj puno de Dio; sed por simpligi ni ne pritraktos ilin.

Nu, la **liberalan** kaj la **socialistan** vidpunktojn ni ne povas ignori, kaj estas senutile pretendi, ke oni estas neŭtrala aŭ "simpla teknikisto". Teknologio estas neniam neŭtrala, ĉar ligita al valor-sistemo kiel ĉio alia, kaj tiuj valoroj integriĝas al ekonomia sistemo.

Kiel maŝinisto, flegistino, instruisto en la Tria Mondo oni rajtas ne aliĝi al politika partio ; tamen niaj ideoj, kompetento, sinteno - eĉ nur nia ĉeesto - enhavas politikan signifon.

La formala respondeco pri niaj agoj eble kuŝas ĉe iu alia, civitano de la gastiglando, aŭ pli altnivele ĉe ministro. Sed fine nia politika influo estos juĝata de la ordinaraj loĝantoj en la lando. Ili deziras scii, kial ni estas tie, kaj valoras tiam havi respondojn por konvinki ne nur ilin, sed ankaŭ nin mem...

POVO KAJ DISVOLVADO

5.1 Ni resumu la celojn de disvolvado :

Laŭ la liberala vidpunkto merkata ekonomio bazita sur konkurenco produktas la plej altan kreskadon ekonomian kaj tial homan disvolvadon. Modernigo ŝtopos la breĉon inter la diversklasaj vivniveloj, inter Oriento kaj Okcidento, inter evoluintaj kaj subevoluintaj landoj. Ni fine ĉiuj atingos la saman celon : la postindustrian konsumsocion amasan. La socialista vidpunkto neas, ke ekonomia kreskado aŭtomate malakrigos la sociajn streĉadojn. Male, sen radikalaj decidoj politikaj favoraj al kooperativa socialismo, nedirektita "kreskado" nur malfavoros tiujn, kiuj malplej kapablas konkurenci, egale en riĉaj kaj malriĉaj landoj.

5.2 Kiu vidpunkto plej ĝuste akordiĝas kun la faktoj? Mi persone opinias, ke la liberala koncepto estas nek konvinka nek inspiriga. Ne konvinka pro la mondskala malabundo de vivnecesaj materialoj: certaj metaloj, brulaĵoj, eĉ pura akvo kaj oksigeno. La tutmonda popolamaso neniam povos atingi la vivnivelon de mezklasa nordamerikano aŭ sviso. Mi ankaŭ ne kredas, ke la riĉuloj iam konsentos sen batalo forlasi siajn privilegiojn, kiel ajn dika fariĝus la nacia "kuko".

Cetere, ĉu ni dezirus tian mondon, kie ĉiu familio havus privatitan lavmaŝinon, kolortelevidilon, unuan kaj duan aŭtomobilojn? Al mi tio aspektas kiel premsonĝo kondukanta al ĝenerala avido, malŝparo kaj polucio.

La socialista vidpunkto inverse celas socion, kie ĉiuj (vere **ĉiuj**) havos egalan vivŝancon, reliefigante la komunumon kaj la kreeblecojn pli ol la konsumadon. Ĝi ankaŭ agnoskas, ke tian socion oni povas konstrui nur kontraŭbatalante la establitajn privilegiojn, kiujn la profitantoj preferas nomi "nia libereco". Tio estas la vojo al konfrontado kaj al solidareco disportanta nian justemon ĝis la popoloj, kiuj vivas aliflanke de la terglobo, ankaŭ ĝis la venontaj generacioj. Ĝi kondukas al jena difino pri **disvolvado**: la plej justa distribuado de povo inter la homoj.

5.3 Mi elektas la vorton "povo", ĉar ĝi ŝajnas esti la sola faktoro, kiu aperas en ĉiu aspekto de disvolvado - ekonomia, politika, medicina, eduka, aŭ ia ajn. Ĝi iamaniere estas la komuna denominatoro plej ofta koncerne disvolvadon. Edukpenso en Punĵabo, modelfarmo en Etiopio, fiŝada projekto en Sudameriko, hospitalo en Alasko, kvankam malsamaj, ĉiuj estas influpovaj sistemoj.

Ĉiuj volontuloj kaj teknikaj asistantoj vole nevole estas parto de tiu povosistemo dum aŭ ekster sia laboro. Ju pli frue ili konscios pri tio, des pli frue ili kapablos mem prijuĝi la valoron de sia propra kontribuo al disvolvado.

5.4 Povo respondas al ampleksa koncepto. Kiel analizi ĝin kaj unue kion signifas la vorto? Mallonge : vi posedas povon, se eblas al vi regi aŭ ŝanĝi la sintenon de alia persono laŭ maniero, kiu respondas al via deziro. Ekvivalenta termino povus esti "socia regado".

Povo fakte ne estas io posedata kiel ĉemizo aŭ radioaparato; pli ĝuste dirite ĝi estas supera energiofluo en iu rilato. La fluo kompreneble povas esti dudirekta, kiel alterna kurento : la servisto povas influi la mastron, kvankam la mastro ordonas al li kaj ĉiu el ambaŭ bezonas la alian por ekzisti. Nu, de kie venas tiu tutpotenca energio?

Origine el la suno, sed por nia analizo ni diru, ke ni povas mobilizi tri specojn de povo por regi

la konduton de alia persono.

A.La fizika povo

"Restu trankvila", minacas kolera patro al sia filino, "aù mi frapos vin!" Se ŝi fariĝas trankvila, ŝi respondas al la supera povo. (Se la patra minaco ne efikis, tiam la patro ne havas povon sur ŝin.) Simila perforta minaco paroligas malliberulojn en la torturĉambroj; simila povo evidente konstruigis la piramidojn.

El tiu supera energio fizika fontas militista registaro, prizono, polico kaj iuj psikiatria hospitaloj. La sama povo havigis al Okcidento ties koloniojn. La homo Vendredo eble estis fizike pli forta ol Robinson Crusoe, sed Crusoe tenis fusilon. Tiu fizika povo troviĝas baze de nia tuta teknologio hodiaù. La drogoj uzataj de kuracisto por trankviligi mensmalsanulon estas malsimplaj kemiaĵoj koncentritaj de industrio, kiu konsumas egajn kvantojn da fizika energio. Insektomortigiloj, traktoroj, ĉiuspecaj maŝinoj, drogoj... per kiuj ni intencas solvi la problemojn de la Tria Mondo, ĉiuj havas sociajn konsekvencojn influhavajn rilate la konduton de la tiea popolo.

Do ne necesas persone posedi armilon por influ sur popolon dank'al fizika povo. Ne nur via teknologio estas imprese persvada, sed vi estas normale identigita de la loka popolo kun la "ekzistantaj potencoj" kaj en la landoj de la Tria Mondo hodiaù la ekzistantaj potencoj kunportas proprajn fusilojn.

B.La ekonomia povo

Dum la fizika povo malantaù lia dorso minacas la homon, la ekonomia povo minacas liajn poŝojn. Estas la povo de la salajro, kiu laborigas virojn kaj virinojn sesdek horojn semajne en la sunvarmo sur senlimaj plantejoj aù en la fabrikoj de Seulo, Boĥumo, Leningrado aù Detrojto meze de bruoj, varmo, vaporo kaj senĉese funkcia maŝinaro. Ankaù estas la potenco de striko kaj de lokaùto. Inter ĉiuj sociaj kondutoj la produktivo - ĉe la bazo de riĉeco - memkompreneble estas la plej grava por regi. Kaj la ekonomia povo samtempe konsistigas socian regrimedon eĉ pli fundamentan ol la fizika povo.

Eĉ hodiaù homoj ankoraù interbatalas por havi

ilojn; la venkintoj akiras ŝancon labori unu tagon tiel gajnante kelkajn cendojn por aĉeti familian nutraĵon. Tio estas la plej brutala ekzemplo de ekonomia potenco, sed la sama sistemo regas ĉie, kie estas amasa senlaboreco. Ekonomi-politika sistemo certe pravas sian tutan senvalorecon, se ĝi ne povas garantii utilan laboron al sia tuta popolo!

Teknologio ludas sian rolon ankaŭ ĉi tie. La tutmonda sistemo de patentoj (speciale tiuj vole ne uzataj), la blokliverado en malriĉaj landoj, kiu devigas ilin aĉeti kompletan teknologian kompleksan, la trompo ĉe kontĝirado kaj la troaltigo de la prezoj en la pli malriĉaj landoj, ĉio tio montras ekspluatadon fare de ekonomia potenco.

Por ĝuste taksi iun ajn disvolvad-projekton en la Tria Mondo evidente necesas konsideri tiun vidpunkton. Kaj ni ne forgesu tiun potencon je individua nivelo. Vizitu unu el la 15 000 prostituitinoj en Adisabebo, uzu ĵinrikŝon en Kalkato, surgrimpu Kilimanĝaron kun dungitaj portistoj kaj vi uzas vian ekonomian superecon ne favorante pli justan distribuadon de la potenco.

C. La kultura povo

Ĝi efikas sur la homajn spiritojn. Ĝi direktas ilian konduton influante (aŭ eĉ kreante) iliajn kredo- kaj valorsistemojn.

Instruu al infano tiamaniere, ke ĝi pensu pri "ĉielo", "peko", "savanto"; ĝia konduto poste montriĝos certe malsama ol tiu de persono, kiu kreskis vidante la mondon tra la vortoj "klasbatalo", "alieneco" aŭ "papertigroj".

Ĉiu persono laboranta por disvolvado en la Tria Mondo uzas tiun povon en kaj ekster sia laboro, ĉar ni ĉiuj vole nevole estas kultur-vendistoj. Ekzemple, pri la lingvo, kiu fundamente influas la konceptojn, kiujn ni havas kaj transdonas al aliaj : kiom da disvolvad-laboristoj normale elektas paroli la dialekton de la komunumo, ĉe kiu ili servas? Kiom da ili restas ligitaj al la angla, la franca, la hispana?

Lernejoj, religiaj misioj, reklamagentejoj, "British Council", "l'Alliance française", "Goethe Institut", Usonaj, Sovetaj kaj Ĉinaj "kulturcentroj", ĉiuj

konkurenco por regi la homajn spiritojn en la Tria Mondo.

Reklamŝildoj pri "Coca Cola" atingis la plej izolitan vilaĝon; kaj eĉ pli malproksime : se post grimrado laŭ kapropado vi, iom laca, ripozas supre de la monto rigardante senfinajn herbejojn, de malantaŭ iu roko aperas nudpieda junulo, kies transistoro blekas : "ASPRO ĉesigas doloron; uzu ASPRO'n!" Kial la kultura povo estas tiel grava? Ĉar oni uzas ĝin por kondiĉigi la homajn spiritojn, tiel ke ili cedu al la du aliaj formoj de povo: fizika kaj ekonomia.

5.5 Iuj sugestas, ke la "eksperto-povo" estu subfako de la kultura povo. Ili diras, ke en niaj teknike evoluintaj socioj oni pli kaj pli decidas surbaze de la konsiloj de ekspertoj tiagrade, ke la tradicia politiko povas cedi la lokon al profesiula regado. En subevoluinta lando tio povas esti eĉ pli vera koncerne ne nur la naciajn aferojn sed ankaŭ sur la loka nivelo. Senspertaj eŭropanoj kaj amerikanoj ofte ŝarĝas sin per respondeco, kiu multe superas ilian kompetentecon. Juna volontulo preparas por la duagrada lernejoj de Kamboĝo tutlandan programon pri la angla lingvo. Mekanikisto flegas etiopiajn vilaĝanojn per siaj propraj kuraciloj : "Uzu tiun ĉi unufoje tage kaj revenu post unu semajno." Kaj la vilaĝanoj obeas sian novan "kuraciston".

5.6 La temo **kondiĉigo** necesigas kelkajn pliajn vortojn. Se mi havas nur fizikan aŭ ekonomian povon sur unu homon, mi faras lin sklavo. Li obeas miajn ordonojn, sed kontraŭvole kaj iam li povos ĉesigi mian regadon.

Sed se mi posedas kulturen povon sur lin, se mi akceptigas al li miajn ideojn pri la mondo, miajn taksmanierojn koncerne lin, li fariĝas ne mia sklavo, sed mia fidinda **servisto**.

Kaj la servistoj estas la pilieroj, kiuj subtenas daŭran privilegion.

5.7 Ni memoru, ke la tri specoj de povo longĉene efikas kaj la tri tipoj de influo ofte intermiksiĝas.


Vilaĝano en Niĝerio devigas sian bebon (fizika povo) manĝi importitan nutraĵon konservitan en ŝkatolo anstataŭ nutri ĝin per propra lakto. Kial? Ĉar oni persvadis ĝin, ke mamnutro estas malbela

kaj eksmoda. Kiel venis al ŝi tiu ideo? Ŝi iris al Lagos kaj vidis grandajn afiŝojn, kiuj montras dikajn bebojn sur la brakoj de junulinoj vestitaj kiel flegistinoj; ŝi komprenis, ke la nutraĵo enskatoligita certe estas "Pli bona por bebo" (kultura povo). Krome ŝi senpage ricevas plastan suĉbotelon (ekonomia povo) ĉiufoje, kiam ŝi aĉetas kvar skatolojn.

Kiu faris tiujn erarigajn afiŝojn? Iu reklamagentejo, pagita (ekonomia povo) de la promocio fako de eŭropa kompanio vendanta nutrokonservaĵojn, laŭ la konsiloj de psikologoj (eksperto-povo) kaj laŭ ordono de la entreprenestro (ekonomia povo), kies unua devo rilatas al lia kompanio kaj ties akciuloj.

Pro tio neniu decido, neniu socia agado povas esti simple konsiderata kiel loka evento. Male ni povas vidi ĝin, kiel la rezulton de influoj, kies origino situas malproksime eble je pluraj miloj da kilometroj.

5.8 Se ni nun ligas la ĉi-supran rezonadon al la kunteksto (pri subevoluo kaj fluo de la riĉaĵoj) skizita en la 1-a figuro, jen kio aperas :



Koncerne la subevoluo-procezon oni povas difini povon kiel armilon de la riĉuloj. Fortoj fizikaj, materiaj aŭ kulturaj transiras de nivelo al nivelo malsupren, ĉiu per la sama mesaĝo : "Faru tiel, kiel ni diras al vi. Viaj superuloj plej bone scias. La situacio pliboniĝas. Vi povas sukcesi tiel, kiel ni sukcesis. Pro tio faru tiel, kiel ni indikas al vi."

5.9 Jen do, kia estas la teorio.

Ĉu ĝi reale povas esti aplikata al programoj pri internacia helpo, al teknikistoj sincere laborantaj por plibonigi la popolan vivnivelon, al malproksime izolitaj instruistoj kaj misiistoj, kiuj helpas la infanojn trapasi ekzamenojn aŭ diskonigas novajn semojn kaj novajn fekundigilojn?

PIRAMIDOJ DE PRIVILEGIOJ

6.0

Ni nedubeble ĉiuj akordiĝas pri tio, ke Disvolvado signifas por ĉiu estulo vivon pli sanan, pli feliĉan, pli enhavan kaj pli signifoplenan. Ni jam antaŭe difinis disvolvadon kiel pli justan povopartoprenon flanke de la popolo. Kaj la povopartopreno en iu socio speguliĝas en ĝiaj institucioj.

Do ni ĵetu rigardon al la institucioj nun starigataj en la Tria Mondo kaj ni demandu nun, ĉu ili iel rilatas al pli justa povopartopreno.

La plej okulfrapa fakto estas, ke plejmulto el la institucioj de la Tria Mondo aspektas kiel eksportitaj kopiaĵoj de eŭropaj aŭ amerikaj modeloj.

6.1 Eŭropanoj malkovris malsanecon ĉe la tribanoj kaj tuj ekpensis : Kuraci kaj tiucele krei hospitalojn, apotekojn, medicinajn lernejojn... Eŭropanoj alvenis en analfabeta medio kaj pensis : eduki, kaj tiucele konstrui elementajn kaj mezgradajn lernejojn, universitatojn... Ili trovis homojn trinkantajn palmvinon, kun pluraj edzinoj, kaj senhonte nudaj; ili decidis savi, t.e. establi misiojn, seminariojn, katedralojn... Ili malkovris fekundajn ebenaĵojn, arbarojn, amasojn da kuproercoj kaj revis pri akciaj kompanioj, konsorcioj, plantejoj, fabrikoj, asekuroj, Centra Banko... Ili estis, kaj hodiaŭ ankoraŭ restas katenitaj al tiu penso : krei instituciojn.

Sed ĉiuj tiuj institucioj, kiaj ni eŭrop- kaj nordamerik-

anoj konas ilin, estas povopiramidoj, striktaj hierarkioj, en kiuj via rekompenco des pli kreskas, ju pli altrangaj kaj malmultaj vi estas.

Ĉu tion bezonas la subevoluintaj landoj? Al kiu iras la profito?

6.2 Ni faru simplan ekzercon ĵetante rigardon al aktuala helpprojekto.

La ĉi-suba tabelo montras la elspezojn koncerne planon por senleprigi provincon en orientafrika lando. Se oni disponigas al vi 70 000 pundojn por unu jaro kaj por la ses buĝetfakoj sube indikitaj, kiamaniere vi povus dispartigi la sekvantajn procentojn?

13%	45%	8,5%	10%	1,5%	22%
1. Medikamentoj				2. Hospital-prizorgado	
3. Vojaĝoj				4. Afrika dungitaro	
5. Eŭropa dungitaro				(60 personoj)	
(8 personoj)				6. Aliaj kostoj	

Utilan indikon pri la efektiva dispartigo de la elspezoj ni devas mencii : la projekto antaŭvidis meznombre 200 pacientojn jare.

La reala elspezo estis : Medikamentoj 1,5% !; Hospitalo 10% ; Vojaĝoj 13% ; Afrika dungitaro 22% ; Eŭropa dungitaro 45 %! ; Aliaj 8,5%.

Ĉar certa nombro da afrikaj dungitoj estis kuiristoj aŭ servistoj je la servo de eŭropanoj, plia parto de la elspezoj iras profite al eŭropanoj. A. kaj K. Holmquist kalkulas, ke ĉirkaŭ 35 000 pundoj (50%) iris tiun jaron al la fremdaj konsilantoj (impostoj ne enkalkulitaj).

Ne miru, ke tiuj samaj eŭropanoj okupis entute la altajn poziciojn laŭ la projekto; ankaŭ ne, ke neniu afrikano ricevis ian edukon profesion.

Ne maloftaj miaopinie estas tiel maljustaj situacioj, en kiuj la eŭropaj "ekspertoj" maksimume profitas de la helpinstitucio.

Sed kompreneble estas malfacile trovi cifertabelojn koncerne la realan manieron, laŭ kiu povo kaj mono estas koncentritaj.

Pro tio ege gravas, ke ĉiu persono forironta partopreni en Disvolvadmision estu informita pri la faktoj kaj konscie mem decida.

La sekvantaj punktoj estas pritraktindaj:

6.3 Strukturo

Por bone komenci sidiĝu kun krajono kaj paperfolio kaj desegnu diagramon pri la projekto, laŭ kiu vi devas labori. Por ĉiu pozicio en la strukturo vi povas noti la salajron, la naciecon kaj la nombron de koncernatoj. Tre simple; tamen modelo ekaperas. Vi ankaŭ povas aldoni aliajn faktorojn : raso, sekso, aĝo, sperto kaj eble nombro de subuloj. Vi indiku la respondecoliniojn kaj nun klare aperas la strukturo. Ne forgesu inkludi la internaciajn rilatojn.

Origino, celoj kaj etiko

Havante nun simplan bildon pri la strukturo oni povas utile ĝin kompari kun la originaj celoj de la entrepreno. Ĉu konforme? Kiu iniciatis la programon? Laŭ kies konsiloj? Kiaintence? Ĉu ĝi estis komencita de la loka popolo kaj kiagrade tiu ĉi rajtas pristudi kaj kontroli ĝian realigadon? El kiu etiko fontas la agado? Ĉu oni egale traktas ĉiujn koncernatojn konsidere al ilia homa digno? Aŭ male?

Decidpovo

Kiamaniere oni decidas? Ni distingu inter la rutinoj, ĉiutagaj decidoj, kiuj grandparte influas la laborplanon kaj tiuj bazaj decidoj, kiuj reale strukturas la planon.

Sekvu la historion de iu decido. Kiu ekzakte en la institucio iniciatis ĝin? Kiu disvolvis ĝin? Per kiuj rimedoj? Je kiu nivelo oni diskutis "por" kaj "kontraŭ" ĝi? Ĉu ĉiuj koncernatoj partoprenis en tiu diskutado? Ĉu oni rapide decidis? Kaj kiel oni diskonigis la decidon? Kiun ĝi favoris? Kiamaniere? Kaj al kiu ĝi igis la vivon pli peniga?

Ĵetu rigardon ankaŭ al kelkaj **nedecidoj**, ĉar tiuj ĉi ege gravas. Ekzemplo klarigas tion :

"Antaŭ naŭ monatoj la dungitaro esprimis deziron havi semajnajn informkunvenojn kun administrantoj kaj surgrundaj laboristoj. Sed la administrantoj ankoraŭ ne decidis, eĉ ne formale diskutis, ĉu pri tio ili akordiĝas aŭ ne. Kredeble ili neniam intencis tion fari."

Kiuj kialoj kondukas al tia nedecido? Kaj profite al kiu?

Teknologio

Ĉu taŭgas havigi al la lokaj loĝantoj ilojn, de ili mem kontroleblajn, per kiuj ili povas plibonigi sian ĉirkaŭaĵon? Aŭ prefere konfidi al ili ege komplikajn metodojn energiavidajn kaj kontrolatajn de malproksime?

Ekonomio

Fine, kiu pagas la tutan laboraron? Kaj kiu profitas de ĝi sur la financa kampo?

- 6.4 Se vi faras tiujn demandojn ĉe la helpinstitucio elektita de vi, surprizus min, se tie vi ne trovas firman rezistadon kontraŭ la povopartopreno de la loka loĝantaro aŭ de la subuloj en la entreprenhierarkio.

Alivorte mi dubas, ĉu vi tie malkovros demokratian institucion.

Se vi opinias, ke ĝi estas ne demokratia, ke ĝi ne ebligas povopartoprenon eĉ interne de la institucio, tiam vi demandu vin, ĉu ĝi vere kontribuas al Disvolvado.

- 6.5 Ion ajn vi malkovru pri la ĝenerala strukturo de via programo, vi ankaŭ decidu laŭ via propra persona vidpunkto :

Kion vi mem opinias pri la povopartopreno?

POVO EN LA PERSONAJ RILATOJ

- 7.1 Ni ne bezonas malproksimen vojaĝi por uzi povon en niaj personaj rilatoj, aŭ por submetiĝi al ĝi. Niaj hejmaj institucioj, lernejo, fabriko, hospitalo, ktp, ĉiuj estas povopiramidoj, kiuj plejparte de la tempo regas nian konduton kaj tra ili niavice ni regas la konduton de aliuloj.

Tia estas la familio, en kiu la patro kutime superas pro la forto de sia ekonomia povo (kaj parte pro sia fizika forto), dum ambaŭ gepatroj ĝuas kulturan povon super siaj infanoj.

Sed eksterlande pro diversaj kialoj kreskas povo tiom pli, ke iu Petro, Paŭlo aŭ Henriko (hejme en Eŭropo) promociiĝas al graveco de fakulo en la Tria Mondo.


- 7.2 **Kiel ni povas taksi nian personan rolon en Disvolvado?**

La ŝlosilo por respondi al tio miaopinie troviĝas

en iu punkto jam pristudita, t.e, ke Disvolvado devas fondi el demokratia koncepto. Mi ne parolas nun pri politika demokratio je nacia nivelo (kvankam tio iam okazu) sed pri demokrateca kvalito de niaj rilatoj je persona nivelo en la laboro, lernejo, klaso, familio.

7.3 Signifoplena maniero pristudi tion estas uzi la verkon de ADORNO, kiu distingas inter la **regema** kaj la **demokrata** personecoj.

Praktikinte variajn testojn pri sinteno koncerne multnombrajn popolspecimenojn, ADORNO kaj aliaj desegnis grafikaĵon ; je ekstremo de ĝi situas la **regema** vivmaniero.




Karakterizas ĝin : granda konformeco kaj obeemo al la potenculoj (krome profunda admiro al ĉio rigora, hardita) kaj aliflanke venĝobezono kontraŭ la pli malfortaj, kontraŭ tiuj, kiuj "diferencas", la afabluloj, la artamantoj. La regema sinteno flegas kulton al propraj raso, lando, grupo dum ĝi timas kaj forpelas la aliajn.

Kiel ĉefo la regemulo provas konservi sian absolutan povon decidi pri la politiko de la grupo kaj pri ĝia agado. Li (ŝi) atentigas konservi la komunikadon vertikala al (aŭ tra) si. Rigida, supera kvankam nekvieta, li (ŝi) timas iniciatojn el malalta nivelo, kiel minacon kontraŭ propra pozicio.

La atmosfero en propra grupo fariĝas konkureca, streĉa, senfida aŭ (ĉe la pli malfortaj anoj) apatia.

7.4 Ĉe la alia ekstremo de la grafikaĵo situas la demokrateca personeco. Ĝin karakterizas ĝia malfermeo, ĝiaj nuancoj, ĝia kuraĝo diferenci.



Tiu personeco fundamente ne timas la aliulojn, nek la nekutimaĵojn, sed vidas en ĉiu persono ĝian kreopovon, iaj ajn estu ĝiaj aĝo, raso, statuso.

Kiel ĉefo li (ŝi) provas atingi, ke la grupanoj plene partoprenu en la listigo de la celoj kaj en la akordiĝo pri la maniero plenumi ilin. Ne ĉiam facile; la homoj laciĝas; kaj tio postulas multe pli da peno ol simple ordoni.

Tamen li (ŝi) provas disdoni respondecon anstataŭ ĝin koncentri. Li (ŝi) favoras la informfluan inter ĉiuj grupanoj tiel, ke ĉiu havu bazon por decidi. Dum la konkurado povas roli kiel stimulo, la grupdinamiko estas kunagado.

Bonvolu ne miskompreni : ankoraŭ temas pri estrado, ne pri memvola malfirmeco, nek pri anarkio. Sed tiu estrado celas bonon por la plejmulto. Tio estas la estrado de amo, ne la amo al regado.

- 7.5 Nu, tiuj du tipoj estas karikaturaj, ne du vere vivantaj personoj, kvankam estas ne malfacile rekoni tiujn tendencojn - regeman aŭ demokratecan ĉe la homoj konataj de ni en la ĉiutaga vivo. Ankaŭ klare estas, ke la du strukturoj antaŭe desegnitaj tre malsimilas : la unua prezentas hierarkion, povopiramidon, kaj la alia estas diamanto kun ĉiuj facetoj interligitaj.

La ĉefoj en tiuj du gruptipoj donas la tonon por la rilatoj inter la membroj. En la grupo estrata de regemulo oni fariĝas regema - por postvivi; en demokrateca grupo aliaj kvalitoj havas ŝancon iam aperi.

- 7.6 La esenca diferenco inter la regema kaj la demokrateca personecoj kuŝas en tio, ke la regema malestimas la malfortulojn sed admiras la potenculojn kaj obeas al ili, dum la demokrateca - pro iu malica kialo - ĝuste male reagas. Li (ŝi) sentas neceson stari flanke de la malfortuloj, ĝuste ĉar ili **estas** malfortaj, kaj li (ŝi) sentas la bezonon demandi kaj kritiki la fortulojn :

Tio signifas, ke demokrateca personeco ĉiam provos transmeti la iniciaton de la fortuloj al la malfortuloj. Kaj tio efektive signifas **pli justan povopartoprenon** menciitan de mi jam plurfoje.

- 7.7 Ni nun revenu al nia helpanto por Disvolvado, foriranta la unuan fojon malproksimen, ni diru en Afrikon. Kio povos okazi al li?

Supozante, ke li staras mezdistance sur la grafikaĵo inter Regemo kaj Demokrateco en la momento,

kiam li enaviadiliĝas por flugi suden, kia fariĝos li?

BLANKAJ FORMIKOJ KAJ NIGRAJ

Strange. Ilin mi jam renkontis unufoje okaze de karitato-marŝado profite al OXFAM kaj al Kristana Helpasocio.

Poste ripozantaj en ilia eta apartamento de la Pitkroft-Strato ni tie solvis la mondajn problemojn. Jakobo estis la inĝeniero de la Bideford-kromvojo (kaj tiu de la fazeoloj sur toasto, mi memoras) dum Monika multhore studlaboris por fariĝi flegistino. Antaŭ jaroj tiel estis.

Hodiaŭ vespere ni denove renkontiĝas. Ilia gasto mi estas unufoje pli, sed hodiaŭ en N'kpwepwe. Trinketante duan "Dubonnet" ni atendas... Jakobo, Monika kaj mi.

Ekstere en varma malhelo ĉirpas la cikadoj kaj malproksime fulmotondras rozkolore. Minutoj pasas. La tablo estas preta, kun tuko amelita. Glacipecoj premĉirkaŭas la poton de boligita akvo.

Ankoraŭ atendas ni...

Jakobo : ...Tiu damnita kuiristo! Kion li faraĉas kun la supo?

Denove funkciigas la sonorileton.

- Finfine Jozefo! Kie vi estis? La vespermanĝo okazu je la sepa akurate!

- Mi petas pardonon, Sinjoro. Mi petas pardonon, Sinjorino.

- Ne. Unue nia gasto ; poste Sinjorino! Dio mia!... Kiomfoje?

Ni heredis ĉi tiun de "Peace Corps"-volontuloj, kiam ili foriris, sed kia elreviĝo! Li devus esti sperta : ili ricevis lin de iu Greko, kiu ricevis lin de baptista misio, kiu tiris lin el ĝangalo. Vi povas vidi, ke li estas N'toto, laŭ liaj altaj vangostoj. Senvaloroj homoj, ĉiuj.

- Supon, Sinjoro? Pardonon, Sinjorino.

- Ŝtelisto : traserĉema, li prenas miajn ŝtrumpetojn, razilajn klingojn, kandelojn, sukeron ; ni nomas lin la Nigra Formiko ; ĉio revenas en la ĝangalon. Ĉu ne, Jozefo ? Li ne komprenas. Vidu, kiel li kliniĝas kaj ridetas. Ili reale estas dumvivaj infanoj.

Sed elturniĝemaj. Dum unu monato ĉe ni li jam havis tempon foriri al edziĝfestoj, al enterigo kaj al du "religiaj festoj". Li nun diras, ke lia edzino devas vojaĝi al Bamba por viziti malsanan parencon kaj "Ĉu li povas ricevi antaŭpagon?" Komence ni falis en tiun specon de fabelo pruntante al niaj servistoj gravajn sumojn, ĉu ne, kara? Nun ne plu. Eĉ ne unu dolaron, Jozefo, ĝis venonta vendredo.

- Pardonu al mi, Sinjoro. Pardonu al mi, Sinjorino.

- Pri la projekto? Mi povus agi duoble pli rapide, se ne intervenus lokaj influoj, burokrata malordo, korupto.

Se ili vere volus (kaj se ni havus riparmaterialon por "Caterpillars") ni povus atingi Benda'n antaŭ ol la pluvo komenciĝos. Mi pledas antaŭ ili. Mi blasfemas. Sed ili ne volas sekvi la planon.

La ministro pri trafiko estas multe tro okupata kun siaj plezurviroj kaj ĉiamaniere la vojo jam trairis lian vilaĝon; kial do li zorgus pri ĝi?

Mi ne estas rasisto, sed Afrikano verdire vivas en la nura nuno, ne volas analizi, ne povas plani. Li detruas traktoron pro oleoguto, kaj se vi turnas la dorson, vendas ĉe bazaro la rapidumskatolon. (Nu, ne veturu sola al la bazaro. Tiel ordonis la soldatestro. Se vi dispremas kokidon, la tuta svarmo atakas vin. Veturu plu!)

Almenaŭ la Armeo estas io firma. Sen ĝi ĉio ĉi tie pereus. En marto oni pendigis kvin teroristojn sur la placo. Veturante tien ni vidis ilin balanciĝantaj. Ĉu ne, kara? Jen foto farita per teleobjektivo Minolta kun blua lumfiltrilo. Aĉetita senimposte en la flughaveno.

Kaj pri hotelo "Afrique" kion vi opinias? Se vi nur iom insistus, oni estus aranĝinta por vi loĝebl-econ en Hilton kun multe pli granda naĝejo. Tie ni naĝas ĉiufoje, kiam ni estas en la urbo. Lastan semajnon ni veturis cent sesdek kilometrojn por akiri ŝinkon ĵus venintan de Nairobi.

Ne. Konservu por vi vian Eŭropon kun ĝiaj nebulo, strikoj kaj politikaj krizoj. Ni elektis Aŭstralion aŭ eble Sudafrikon por la venonta jaro, se oni ne renovigos nian kontrakton.

Estas vere; por Monika la tagoj aspektas longaj, kvankam ŝi nun rajdas. Svedoj kaj germanoj ofte vizitas nin kaj vespermanĝas - iam ni surprizis ilin per "smørgasbord" kaj "akvavit" - ankaŭ estas tenisturniroj sabate. Post la pluvsezono venas la "safari"-epoko. Oni foriras de ĉi tie direkte al Serengeti kaj N'gorongoro.

La bestoj estas la plej interesa afero en Afriko. Ili estas fieraj, ili estas puraj, kaj prudentaj. Ne kiel la popolo.

Ha! pri disvolvado! Neniu ŝanco dum ili naskas kiel pavianoj. Fakto estas, ke ili ne **volas** progresi. Antaŭnelonge Monika diris al Jozefo, ke ŝi volonte instruus al lia edzino legadon kaj skribadon, kuirarton kaj higienon. Ĉio aranĝita. Sed la virino neniam venis. Tipa kazo.

De kiam foriris la volontuloj de "Peace Corps", niaj nuraj amikoj estas Johansson-familio - kaj en decembro ili transiros al U.N.-servo.

- Pardonon, Sinjoro. Pardonon, Sinjorino.

- Ha! Jen vi. Ni bezonas pli da glacio por la trinkaĵoj. Kaj vi povas forporti tiujn pladojn. Ne purigu nun la teleraron, estas malfrue. Vi povos tion fari morgaŭ matene.

8.1 En la antaŭaj linioj la personaj nomoj kompreneble estis ŝanĝitaj sed ĉiun frazon mi aŭdis el la buŝo de iu aŭ alia elpatriiĝinto. Mi ankaŭ ne troigis la tipajn sintenojn. Kelkajn aŭtentajn diraĵojn mi ne kuraĝis inkludi pro timo, ke ili aspektus karikaturaj!

La koloniisma menso ne forpasis je la alveno de politika sendependiĝo nek ĉe eŭropanoj, nek -ve!- ĉe multaj popoloj de la Tria Mondo.

Kvankam ne estas scienca pruvo (pri tio necesus esplori), mi konvinkigis, ke plejmulte da eŭropanoj fariĝas **videble pli regemaj** dum sia regado en subevoluinta lando - eĉ kiel simplaj turistoj.

8.2 La ĉi-supra konversacio ilustras tre oftajn sintenojn:

a) **etnocentrismo** t.e. malamo kaj timo rilate aliajn rasojn (kvankam en tiu kazo la eŭropano fakte apartenas al malplimulto kaj teknike fariĝis la fremdulo);

b) **aroganta decidmaniero** kun Jozefo kaj sendube

kun la dungitaro ĉe "lia" projekto pri vojkonstruado.
c) **admira** al disciplino kaj povo, kaj sistema humiligo de malfortuloj.

Dum tri jaroj en Afriko mi vidis tiun regemon instaligi ĉe miajn laborkolegojn, ĉe bonajn amikojn, ĉe min mem.

8.3 La kialo de tio estas sufiĉe klara.

Ĉiu el ni havas regeman flankon en sia personeco - nenio miriga en tio, ĉar la plejmulto el ni iam submetiĝis al iu premregularo sub iu aŭ alia formo sed hejme tio povas esti retenata.

Ni subite alvenas en socioj, kiuj malkaŝe favoras regemon, kiuj laŭspirite ankoraŭ estas kolonioj. La riĉuloj - kelkaj nun kun nigraj vizaĝoj - ankoraŭ lukse vivas en modernaj kvartaloj, dum la malriĉuloj ankoraŭ kolektas restaĵojn el iliaj rubujoj.

Ĉar ni plej ofte originas el meza klaso, povas esti, ke ni ne petis privilegiojn koncerne salajron, socian statuson, komforton, sed tiuj privilegioj estas al ni trudataj. La Leĝo kaj la Ordofortoj defendas nian rajton kontraŭ almozuloj, ŝtelistoj, revoluciuloj. Tamen cele al Disvolvado ni venis por helpi la ordinaran popolon. Kiel trovi psikan ekvilibron en tia situacio?

La unuajn tagojn la ĵusalveninto sentas sin necerta: kiel kondukti? kion kredi? Li kutime spertas konfliktojn dezirante egale renkonti afrikanojn kaj eŭropanojn - senkonsidere al statuso - laŭ la principo, ke ĉie homoj estas homoj.

Sed li troviĝas gasto de Jakobo kaj Monika - tiel akceptemaj - pretaj gvidi lin. La ironio, la paternalismo de ilia konversacio kontaĝas, kaj la ĵusalveninto jam akiras kutimon. Komence kontraŭvole sed li ridetas je la ŝercaĵoj de sia gastiganto pri la afrikana "stulteco". Li fariĝas serioza kaj ŝokita aŭdante anekdoton pri azia sekretario kaj edzino de eksperto.

Kaj li baldaŭ havas siajn proprajn historietojn por rakonti, pri afrika neefikeco, pri aziaj mallertaĵoj. Necesas, ke li havu. Sen tio oni ne nur konsideros lin kiel tedulon en la koktelkunvenoj sed pli grave oni suspektos lin pri idealismo.

8.4 Oni atendas de li, ke li dungos diversajn servistojn - eĉ mezklasa volontulo nun havu kuiriston aŭ

helpmastrumanton - kun jenaj pravigoj :

a) la tempo de mi - t.e. de eùropa eksperto - estas tiel valora por Afriko, ke eĉ unu minuto ne perdiĝu en tiaj agoj, kiaj teler- aŭ hejmpurigado.

b) mi pagas pli ol la normalan tarifon por servistoj; tiel ili fariĝas ne plu servistoj sed membroj de la dungitaro.

c) ĉar mi havigas laboron, kie abundas senlaboruloj, tio signifas kontribuon al Disvolvado. Se mi havas servistojn, tio ne estas por mia bono, sed por ilia.

ĉ) miaj servistoj amas min, ĉar ili ridas kaj ŝercas kun mi; mi donacas al ili vestojn kaj ilustritajn poŝtmarkojn el miaj leteroj; ili ne konsideras min kiel mastron, sed kiel amikon.

Certe estas io vera en ĉiu el tiuj punktoj; mi tamen opinias, ke ili ĉefe estas oportune pravigaj vortoj. Europanoj dungas servistojn pro ĉefa kialo jena: estas malmultekosta kaj facila maniero eviti la malagrablan hejmlaboron : lavi la vestaĵojn, ordigi la litojn, prepari la manĝojn. Kompreneble la servisto ridetos je viaj ŝercaĵoj, sed servisto restas servisto. Ofte estas afrika aŭ azia "boy" edukinta sin dum la kolonia periodo, kiu metamorfozas en mastron palan universitatan ĵusdiplomiton el Oksfordo. (Komence embarasas vin konstati, ke la malpura kalsono forlasita apud la lito mirakle laviĝis, gladiĝis kaj nete ordiĝis en tirkeston. Sed vi adaptiĝas. Tri monatojn poste via persona tukpurigado estas normala servo atendata de vi).

- 8.5 Ankaŭ lingvaj malfacilaĵoj - kun studentoj, servistoj, komercistoj - povas enkonduki regemon en la homajn rilatojn. La ĝentilaĵoj, kiuj en Eùropo mildigas niajn postulojn : "Ĉu vi estus tiel afabla...", "ĉu vi povus..." ne ĉiam estas facile tradukeblaj en tamilan aŭ amharan lingvojn. Petoj reduktiĝas en seriojn de mallongaj instrukcioj, kiuj baldaŭ iĝas ordonoj.

Ankaŭ la lingvo helpas la rassuperecan tendencon. Parolante slangon finnan, germanan, anglan aŭ francan, elpatriiĝintoj povas tuj starigi barilon, kiu ekskludas iun ajn "fremdulon" de la Tria Mondo. Intenca uzo de komplika ĵargono teknologia povas rezultigi saman efikon : alia maniero ekspluati la pli frue menciitan "povon de eksperto".

8.6 Ĵusalveninto suferos multe da elrevigoj okaze de sia laboro. Li senpacience deziras plenumi sian taskon. Probable li disponas nur du jarojn. Pro tio li volas rapidajn rezultatojn, prefere konkretajn pruvojn fotoblajn, laŭdindan ekzamen-rezultaton aŭ ian ajn ateston pri sia strebado.

Necesos al li sufiĉe da tempo por konscii, ke en la Tria Mondo la homoj estas ege ĝentilaj, ke dekkvinfoje "jes" ankoraŭ povas esti "ne", ke "baldaŭ" povas signifi "probable; en estonto ne tro malproksima; do ne tre esperu."

Elrevigita laŭlonge de la semajnoj li iĝas agresema. Li pli kaj pli konvinkiĝas, ke lia projekto, ke liaj solvoj estas vivesencaj. Li fariĝas furioza. Li postulas renkonti la ministron (kion li neniam imagus fari en sia lando malgraŭ iaj ajn elreviĝoj). Li apelacias al la organizo, kiu sendis lin kaj eble al la ambasadoro por antaŭenigi lian aferon. Konfliktoj aperas jam ĉe la difino de iu problemo. La eŭropano diras: "tio ĉi estas via problemo kaj do tio estas la ĝusta solvmaniero." Sed povas esti, ke la homoj naskiĝintaj en la lando (kaj tie vivontaj ankoraŭ longe post foriro de la eŭropano, kies projekto fariĝos por li nur ekzotika memoro) difinos la saman problemon alimaniere eble en rilatoj kun la lokaj instancoj koncernataj.

Kiam afrikano dekomence ne akceptas la eŭropan difinon de iu problemo, la eksperto rememoras, ke la kaŭzo povas kuŝi en "socia aŭ kultura blokado". Se li ne akceptas nian vidpunkton la duan fojon, la tendenco glitas al la konkludo, ke "ili agas kiel infanoj". Sed se post la tria aŭ kvara fojo li ignoras, misuzas aŭ forpuŝas nian Veron, tiam la eŭropano ekkonsideras la afrikanon kiel obstinan idioton.

8.7 La ĵusalveninto travivos aliajn ĉagreniĝojn. Li povas malkovri, ke kelkaj civitanoj el la Tria Mondo ne speciale deziras lian varman amikecon. (Kial ili dezirus? Ili havas proprajn zorgojn; ilia porviva baraktado ne estas ia ŝercaĵo). La ĵusalveninto povas suferi pro varmego, malsano, kramfo, pulopikado. Lia Hi-Fi materialo povas esti blokita dum monatoj en iu urbo ĉe la marbordo je miloj da kilometroj. Povas esti, ke li deziras scii, kiel

ludis Liverpool kontraŭ Benfica. Al kiu li sin turnu?

8.8 Naŭfoje el dek la afero estas simpla : li turnas sin al aliaj blankuloj. Tion ili atendis. Ili simpatias. Krom la laborkontaktoj, eksterordinara edziĝfesto aŭ vizito al studenta hejmo li ne pasigos multe da tempo provante proksimiĝi al la popolo por ĝin pli bone koni. Estas malfacile konservi unu piedon en du kampoj kaj li estas serĉanta firman grundon, aprobindan sistemon de valoroj kaj sintenoj, kiu sekurigas lin. Li trovas kaj adoptas ĝin - aŭ ĝi adoptas lin. Eŭropanoj uzis ĝin dum jarcentoj sin helpante per sia avantaĝo de fizika, ekonomia kaj kultura povoj. Tion oni nomas superregadon. Afrik-, azi- kaj latinamerikanoj ne estas surprizitaj. Ili vidis ĉion ĉi, kio jam okazis.

8.9 Iuj povas argumenti, ke tio ne gravas. Ili konsilas: lasu vian laboron indiki la mezuron de via sukceso. Konstruu vian vojon, kreskigu pli da maizo, operaciuj aliajn apendicojn - la homaj rilatoj demokrataj estas nur duarangaj.

Mi ne akordiĝas kaj tie ĉi ni revenas al la temo "povo".

Koncerne povon regemo ĉe la helplaborantaro tute kontraŭas disvolvado.

Ŝajnas al mi, ke iu kuracisto, instruisto, teknikisto - eĉ la plej lerta - agas kontraŭ Disvolvado, se li devas kalkuli kun la hierarkia povo por esti kapabla plenumi sian funkcion. Ĉar reala Disvolvado ne konsistas en plenumado de iu aŭ alia laboro, sed en agado tia, ke la popolo fariĝas fidema, informita kaj sciavida. Ekde nun.

Tio estas ne "malproksimaj celoj" de Disvolvado, kiel iuj volus kredi al ni. Fidemo, klarvido kaj sciavido estas la veraj rimedoj por disvolviĝi.

8.10 En la iluminata operaciĉambro de moderna hospitalo ĉe iu ĉefurbo de la Tria Mondo kirkirurgo ekzemple savaŝ la vivon de 150 pacientoj dum la jaro. Li ankaŭ instruas al pluraj kirurgoj de la Tria Mondo kiel diagnozi kelkajn kormalsanojn kaj kiel praktiki kirurgiajn teknikojn. Tiam kun ili li dividas sian povon kaj igas ilin pli fortaj. Sed je kia kosto? Por sukcesi la kirurgo postulas absolutan obeadon, tre multekostan teknologian ekipaĵon, multnombrajn kaj variajn kuracilojn, skipon da anesteziistoj, flegist-

inoj, kuracistoj, vartistinoj, sekretarioj - fakte la kompletan institucion de granda centra hospitalo. Sen tiuj li estas perdita, kiel reĝo sen sia kortumo. Por respondi al tiuj postuloj triamonda lando ege pagas. Ĝi pagas per la sano kaj la vivo de dekmiloj da personoj en kamparaj regionoj - tiuj, kiuj malsaniĝas kaj mortas ĉiujare pro manko de pura akvo, de simpla kuracado, de saniga edukado, de taŭga dieto.

Liaj vivoj povus esti savitaj dank'al alia politiko pri Sano : politiko dediĉata al plej larĝa partopreno en la povo, kun multe da malgrandaj klinikoj, medikamentoj surloke preparitaj - eble el plantoj - grandskala vakcinado, programoj pri nutrado kaj pura akvo.

Sed en la plejparto de la triamondaj landoj tio ne povas okazi, ĉar ties elitoj adoptis jenan etikon: Kuracado estas pli profitdona ol preventado; oni prefere resanigu dek tre gravajn kazojn, kiuj povas atingi la hospitalon, ol helpu milojn, kiuj ne povas. Ĉu nia korkirurgo povus iĝi demokratema konservante sian postenon en hospitalo de la Tria Mondo? Al mi tio aspektas kiel kontraŭdiraĵo. Lia statuso postulas, ke oni traktu lin ege respekteme dum (kaj ŝajne ankaŭ ekster) la laboro. Lia tekniko estas tiel rafinita, ke nur kelkaj selektitaj kolegoj povas lerni ĝin. Liaj malsanuloj prezentas kazojn interesajn, indajn je kuracado, pridiskutado kaj raportado en scienca revuo, sed li neniam traktos ilin kiel egalulojn. Lia salajro kaj liaj privilegioj estas fiksitaj konforme al lia alta nivelo.

Ke li ekpensus demokratmaniere favorante la demandadon, postulante por ĉiuj egalan rajton al kirurgia kuracado, dezirante pli altan salajron por la dungitaro kaj ties partoprenon en la Administra Konsilantaro de la hospitalo... Neimageble, se li volas konservi sian pozicion.

- 8.11 Por elpatriiĝinta instruisto la problemoj pri demokratiaj rilatoj estas malpli akuta, ĝi tamen ekzistas. Regemo tradicie estras la lernejojn kaj la instruistoj profitas de aparta statuso, ĉefe se ili uzas sian hejman lingvon por instrui kaj havas amason da universitataj paperaĵoj por elmontri.

Kompreneble instruisto devas konservi ian aŭtoritan

taton, sed por efektiviĝi realan instruon, necesas ke demandprocezo ekestu en la spirito de ĉiuj studentoj. Tio estas vitala, por ke la instruista aŭtoritato ne degeneru en superregadon.

Por konservi sian aŭtoritaton - kvankam forlasante sian povon - instruisto devas respekti la dignon de siaj lernantoj, eĉ se li okazigas al li(ŝi) iajn malfacilaĵojn. Kompreneble estas pli facile skribi tion, ol ĝin plenumi. Plie por esperi ian sukceson ŝajnas, ke necesas kunigi tri aliajn kondiĉojn :

- a) la instruisto komprenu la lingvon de siaj lernantoj kaj ne estu fremda al ilia vivmedio.
- b) la instruisto zorgu pri la bonstato kaj progreso de la tuta grupo, ne nur de la plej naturdotitaj.
- c) la lernejo-sistemo ebligu la kondiĉojn a) kaj b).

Verdire oni povus miri, se iu elpatriiĝinta instruisto sukcesus konkretigi verajn rilatojn demokratecajn en triamonda lernejo. La ekzamsistemo krude nuligas tian strebadon. Same la sinteno de aliaj instruistoj. Kaj ankaŭ la programo pritraktata. Tion pli bone klarigos la sekvanta ĉapitro.

EDUK-PROJEKTO EN KAMPARA REGIONO ABA Unua parto : Aba-regiono (priskribo)

Ne ĉiujn jam menciitajn punktojn celas pritrakti ĉi tiu studo; ĝi estas ekzemplo de aparta kazo. La priskribo de edukadprojekto en kampara regiono de "Afroland" entenas datojn, statistikojn kaj alian informaron, kiuj ĉiuj rekte baziĝas sur faktoj; nur la loknomoj estas ŝanĝitaj.

- 9.1 Aba-regiono estas verda, monteta kaj sufiĉe akvumata, kaj mirige milda malgraŭ sia situo en tropika lando. Kvankam je nur kelkaj mejloj de la movoplana ĉefurbo de Afrolando kaj iu el la unuaj partoj koloniigitaj, kaj kristanigitaj, ĝi restas tipe afrika kamparo.

La 35 000-persona loĝantaro de Aba frontas kontraŭ multaj problemoj spite al tiel multjara kontakto kun Eŭropo. Tio klariĝis antaŭ mi okaze de ĵusa vizito. Biciklante de vilaĝo al vilaĝo kune kun afrikaj dungitoj de la ministerio pri Sano kaj Disvolv-

ado, ankaŭ kun la novpostenigita Administranto de la regiono, mi povis aŭdi la vilaĝanojn, kiuj levis ankoraŭ kaj denove la sekvantajn problemojn:

a) Neniu kuracisto. La cirkulanta kliniko, kiu devus ĉeesti duontagon ĉiusemajne, ĉesigis siajn vizitojn antaŭ ses monatoj.

b) Nesalubraj loĝejoj, nesufiĉa provizo de pura akvo, manko de nutraĵo.

c) Manko de komercaj centroj; manko de konsiloj por kultivi ion vendeblan; neceso pli bone organizi la vendadon de rikoltitaj produktoj (nun regatan de kelkaj kamionposedantoj); neceso altigi la vendoprezojn en la regiono kaj neceso tuj pagi la produktojn liveritajn al la komercistoj.

ĉ) Manko de okupoj dum la liberaj momentoj. Necesas distraĵoj, sportinstalaĵoj.

d) Manko de lernejoj kaj de lernejaj konstruaĵoj, de loĝejoj por instruistoj; mankas horizontala grundo por aranĝi sportterenojn.

e) Manko de elektro en la vilaĝoj.

f) Malbonstataj vojoj. Izoleco.

9.2 Kvankam Afriko laŭdire pasiigis pri edukado, estas interese noti, ke la ekonomiaj kaj prisanaĵaj aferoj laŭorde enskribiĝas antaŭ la lernejoj.

Tamen estas vere, ke multaj personoj kredas, ke lernejo estas la nura rimedo por eviti malriĉecon en kampara medio.


Ĝuste malriĉeco estas karakteriza trajto de Aba-regiono. Sed ĉi tie aperas la paradokso : Aba-regiono estas riĉa!

9.3 Unue estas tri grandaj teoplantejoj dungintaj 2 200 laboristojn kaj vendantaj teon kontraŭ pli ol 4 1/2 milionoj da usonaj dolaroj jare. Sed ĉiuj plantejoj apartenas al fremduloj. Ĉiuj salajroj kaj impostoj ĉiujare pagitaj al Aba-laboristoj kaj al Aba-administrejo entute sumiĝas je ĉ.


635 000 dolaroj. Ekzistas ankaŭ pluraj gravaj farmoj (kies posedantoj estas afrikanoj) produktantaj kafon kaj kotonon; ankaŭ manufakturoj por senŝeligi kaj purigi la kafograjnojn. Iliaj posedantoj vivas sufiĉe kontentige, kvankam la mono ricevita de ili okaze de vendo al la lokaj komercistoj reprezentas apenaŭ la duonon - kelkfoje ĝis la sesonon de la vendoprezoj al la konsumantoj.

La pli malriĉaj farmoj produktas nur fazeolojn kaj bananojn, sed ili frontas la saman problemon; la prezo de iliaj produktoj duobligas aŭ triobligas inter la manoj de makleristoj.

- 9.4 Estas vere, progresemaĵ farmistoj povas nun pruntepreni monon (nerekte el Monda Banko) por aĉeti teplantedojn aŭ sterkon, sed ili estas devigataj vendi sian teon al la manufakturoj proksimume la sesonon de la fina vendoprezo. La interezprocento de ilia prunteprenita kapitalo unuavide aspektas malgranda - nur 1% - ĝis oni rimarkas, ke temas pri monata interezo (1971).
- 9.5 La Aba-popolo pro tio estas malriĉa kaj la regiono subevoluinta. La nuraj bonstataj vojoj, la nuraj elektro- kaj telefondratoj iras al la teplantejoj kaj al Seminario por instruistoj (estrata de europano) konstruita supre de la plej alta monteto meze de gazon- kaj florbedoj.
- 9.6 Piramido figuranta la sociajn tavolojn de Aba-regiono montras jenan strukturon :



La edzinoj kaj familianoj havas la saman statuson, kiel la viroj de ĉiu el tiuj kategorioj. Inter la diversaj tavoloj povas esti komunikado okaze de la laboro, sed malofte en aliaj kazoj. Ni nun ĵetu rigardon al la salajroj de tiuj grupoj (antaŭ impostoj) en 1971 kaj ni vidos, ke pli ol 91% de la impostpagantoj en Aba-regiono perlaboras malpli ol 290 dolarojn jare. Fakte 50% perlaboras malpli ol 215 dolarojn jare.



La eta mezklaso inkludas riĉajn farmistojn, prosperajn komercistojn, instruistojn de elementa lernejo, laboristojn en fabrikoj de teplantejoj.

La supera mezklaso, eĉ pli eta, enhavas unu aŭ du riĉajn farmistojn, instruistojn en la Seminario kaj la ĉefadministrantojn de la teofabrikoj.

Nun estas rimarkinde, ke la **ses restantaj personoj**, el kiuj kvar estas eŭropanoj, kune perlaboras ĉ. 75 000 dolarojn jare.

La plej alte pagita el tiuj ĉi laŭ mia kalkulo perlaboris en unu jaro proksimume 90-oble la mezan salajron de Aba-laboristo.

(Tiel li perlaboras en unu jaro la ekvivalenton de salajroj por tri vivperiodoj, se oni konsideras, ke afrika farmlaboristo eklaboras 15-jara kaj mortas 45!)

Kien iras Aba-regiono koncerne **lokan registaron**, neniu scias. La politikaj partioj estas malpermesataj, ĉia politika aktivado kondukas al mortpuno laŭ militista regularo. Neniu disvolvplano ekzistas pri la regiono kaj neniu loko por diskuti ekster la oficejo de la administranto. Tiu administranto por 35 000 loĝantoj malhavas telefonon, elektron, kaj eĉ mapon pri la regiono en sia oficejo. Sur tiu monteta grundo li vojaĝas bicikle; ne malbone por la lokaj kontaktoj, sed maloportune en urĝa okazo kaj ankaŭ malfacile por kontaktoj kun la centra administrejo, 60 mejlojn malproksime.

9.8 Aba povus esti riĉa regiono plene disvolviĝanta.

Ĝi posedas fekundan grundon kaj povas produkti rikoltojn, kiuj valoras tiel en loka, kiel en monda merkato. Tamen Aba-regiono ne disvolviĝas. Eble en kelkaj lokoj jes, sed la ĝenerala situacio malfavoras la vivŝancon de la popolo.

Ĉu lernejoj en Aba-regiono helpas solvi tiun problemon?

Dua parto : lerneja situacio en Aba-regiono

10.1 En 1971 oni nombris en Aba-regiono 6 900 infanojn inter 6- kaj 13-jaraĝajn. Por ili ekzistis sep lernejoj de la ŝtato subvenciataj kaj povantaj havigi kompletan edukadon elementan dum 7 jaroj. Krome estis dissemataj malgrandaj lernejoj privataj kun profesie nepreparitaj instruistoj por unua- kaj duajaraj klasoj.

Entute 2 789 infanoj estis registritaj en la lernejoj por ricevi kompletan edukadon - t.e. 40%. Duagrada lernejoj tute ne estas en Aba-regiono.

Igrade 40% povas aspekti bona procento sed ni memoru, ke 2 789 estas la nombro registrita la unuan tagon de la studjaro. La procento de forlasantoj estas alta kaj la infanoj ofte ne vizitas la lernejon pro malsano aŭ pro farmlaboro.

Inter 1967 kaj 1970 el ĉiuj infanoj de la regiono nur 623 entute sukcesis fini la sepjaran studadon trapasante la finan ekzamenon. Kiel ili sukcesis? Tion ni vidos poste.

10.2 La lernejoj mem malbonstataj, kun rompitaĵoj, estis konstruitaj kaj pagitaj de la gepatroj. Sed tio ne estas la fino de iliaj elspezoj. La studkosto estas alta. Por ununura infano ĝi situas inter kvinono kaj dekonon de meza salajro jara por farmlaboristo. Ĉar la familioj povas havi ses, sep, ok infanojn, la ŝarĝo de studkosto povas ege pezi sur familio jam spertanta tre malaltan vivnivelon. En la sep "bonaj" lernejoj, al kiuj nature sopiras infanoj kaj gepatroj, 39% el la instruistoj estas nesufiĉe preparitaj laŭ profesia vidpunkto, aŭ tute ne preparitaj.

10.3 Multo el la programo de elementaj lernejoj sam-nivelas kun tiu de duagrada lernejo. Ĝi estas kompleksa, akademia kaj plena je pedantaj detaloj. Ĉiu infano obeeme kopias la diagramojn el la

nigra tabulo : LA OKULO (skleroto, koroido...), LA ORELO, LA EKONOMIKA MAPO DE BRITIO (montranta ŝtalon, ŝipkonstruon kaj karbminejojn - dum neniu infano iam vidis karbopecon aŭ ŝipon de post sia naskiĝo).

Se vi demandas la lernantojn, kiuj estas iliaj kvin sensoj, aŭ ĉu la teplantejo kuŝas norde aŭ sude de la lernejo, pri tio ili havas nenium ideon. Nek la instruisto. Oni lernas la ĉefpunktojn kadre de geometrio - per beleta desegnaĵo - samtempe kun kvin-, ses- aŭ okanguloj malkovrante iliajn ecojn, ... laŭ la **reformita** programo de la elementaj lernejoj (1965).

Ilia geografio kompreneble koncernas Afrolandon kaj aliajn afrikajn landojn, sed ankaŭ tre atentigas pri Fiĝioj, Samoa, Gilbert kaj Ellice insuloj (ekskolonioj de Britio). Ĝi ne mencias Sovetunion, nek Ĉinion.

Por la infanoj sufiĉe bonŝancaj, kiuj atingos la sesan studjaron, Historio dediĉas 20-22 lecionojn al la greka kaj romia civilizacioj kaj 13 lecionojn al la unuaj angloj, kiuj "malkovris" Afrikon. Sed dum tiu sama jaro ili havos nur unu lecionon pri la Organizo de Unuiĝanta Afriko, aŭ pri "Hodiaŭa agrikulturo en mia regiono".

Post la dua jaro la tuta instruado okazas en la **angla** (kvankam ĉiuj instruistoj estas afrikanoj), ankaŭ por la fina ekzameno oni uzas la anglan.

10.4 La celpunkto, al kiu kondukas ĉiu faklernado, estas la ekzameno fine de la sepa jaro.

La matematikaj teoremoj, la historiaj datoj ne havas praktikan valoron en si mem, sed ili utilas kiel "ŝlosilvortoj", kiam la infano pretas elteni la ritaron de la eŭropa inicoceremonio.

Do la fina ekzameno estas serioza kaj terura afero. La reputacio de lernejo dependas de la nombro da lernantoj transirontaj en la superan kategorion. Ĉiu infano scias, ke nur tiu rajto ebligas al li eniri duagradan lernejon (supoze, ke li posedas sufiĉan monon por forlasi la vilaĝon kaj por vivi en provinca urbo). Duagrada lernejo, li kredas, estos la ŝlosilo al sukceso, al liceo, al Universitato, al riĉeco - tiu riĉeco, kiu ebligas repagi al lia familio la dumjarajn studkostojn.

En Aba estas libro pli alte taksata ol la Biblio, kaj pli studata. Verkita de Hindo, ĝi konsistas en "Modela demandaro por la ekzameno fine de elementa lernado" kaj por ĉiu modela demando la libro proponas **ĝustan respondon**. Ve! La infanoj kaj instruistoj en Aba laŭvoĉe legas, parkerigas, kopias kaj rekopias **Ĝustajn Respondojn** en ĉifitaj kajeroj...!

Rezultatoj de la ekzameno fine de la sepa jaro por ĉiuj kandidatoj de Aba-regiono dum la jaroj 1967-1970

Nombro da kandidatoj	623	
Sukceso (supera kategorio)	26	4,2%
Sukceso (dua kategorio)	489	78,5%
Malsukceso	108	17,3%

En Afrolando ĉirkaŭ 10% de la kandidataro normale sukcesas en supera kategorio. En la urboj iom pli. La ĉi-supraj ciferoj proksimume figuras la tipe komparajn rezultatojn.

10.5 Do kiun rolon ludas la elementa edukado en la disvolvado de Aba?

Por kelkaj la afero valoras, sed por la plimulto, mi kredas, elementa lernejo en kampara regiono estas nenien iranta buso, troŝarĝita de esperplenaj infanoj kunpremitaj ĉe la pordoj kaj la fenestroj. La kampara lernejo ne edukas, ne fortigas; ĝi selektas. Preparinte kelkajn malmultajn lernantojn por la unuaj paŝoj en akademia kariero de 19-jarcenta Eŭropo ĝi forlasas la malfortunulojn devigante ilin reveni al la farmoj kun manpleno da malĝustaj notoj (en neĝusta angla lingvo) pri la ecoj de kvin-, ses- aŭ okanguloj.

Resume, kiel diris Prezidento Nyerere, ĝi kreas nacion el malsukcesuloj. Psike kaj materiale.

10.6 Sed la historio ankoraŭ ne finiĝis.

La ekspertoj, kiuj gvidas edukadon en la mondo, tre bone scias, ke la programoj en elementa lernejo kampara ne akordiĝas kun la bezonoj de la ĉiutaga vilaĝa vivo.

Malproksime trans la maroj kunvenis en 1966 grupo de tiaj ekspertoj. Ili decidis aranĝi eksperimentan projekton por :

..."esplori, kiel adapti la elementan edukadon

al disvolviĝo de la kampara vivo - tiel helpante redukti la migradon de kamparaj junuloj al la urbo."

La projekto aparte celis :

a) prepari seriozan eksperimenton koncerne ĝeneralan edukadon...kaj teknikan edukadon.

b) certigi kompletan elementan edukadon al kiel eble plej multnombraj infanoj.

c) reformi la programojn, la instrumentojn kaj materialojn en la elementaj lernejoj kaj en la reaktualiga trejnado de jam profesiantaj instruistoj.

ĉ) organizi alfabetigon, ĝeneralan edukadon, metiistatan, nutran kaj sanigan edukadon por junuloj kaj plenaĝuloj, por viroj kaj virinoj.

Kaj tiel decidis la sorto : inter milionoj da kvadrataj kilometroj en Azio, Afriko kaj Latinameriko la ekspertoj elektis koncentri tiun ambician projekton sur... Aba-regionon.

Tria parto : "Xanthosoma Sagittifolium" (serioza kazo)

11.1 Apud unu el la teplantejoj troviĝas la seminario por instruistoj de Aba-regiono. Ĉirkaŭ 200 junuloj diversnivele edukitaj en duagrada lernejoj tie studas antaŭ ol instrui en la vilaĝaj elementaj lernejoj.

En 1969 grupo da internaciaj ekspertoj vizitis la seminarion kaj agnoskis ĝin kiel bazon por "eduk-projekto inkludita en kampar-disvolvado"; post tio kontrakto estis komune subskribita de la Afrolanda edukad-ministro kaj estro de la koncernata Teknika Asistagentejo. Eksperto pri scienca edukado en elementaj lernejoj posteniĝis en la seminario kaj la projekto estis preta efektiviĝi.

11.2 Je persona nivelo tiu projekto ne tre bone ilustras la povo-strukturon, kiun mi antaŭe priskribis. La eksperto ne superregis vastan povopiramidon, kvankam lia salajro igis lin la plej alte pagata homo en la regiono. Li tre simple vivis en malnova domo, luita ĉe la teplantejo, kaj malgraŭ sia klasike regema karaktero li ne havis servistojn krom sia ŝoforo kaj iu studento de la seminario, kiu en lia domo portempe vivis kaj helpis mastrumi. Dum kelkaj monatoj la eksperto havis afrikan

asociiton, sed ili ne bone akordiĝis kaj la afrikano rezignis.

Do tiun projekton karakterizis izoleco pli ol superregado. Tiu ekzemplo tamen montras, kiel disvolvadprojekto povas funkcii neniam alfrontante la veran naturon de subevoluo. Se la teorio jam estas erara, tiam la praktiko havas malmultan ŝancon esti ĝusta.

- 11.3 La strategio elektita celis bazi la projekton sur "novaj lernprogramoj, novaj instrumentoj kaj novaj pedagogiaj rimedoj".

Por esti kapabla realigi tiun novan instrumanieron la eksperto kolektis informojn pri la lokaj klimato, geologio, flaŭro kaj faŭno. Li multobligis listojn de la regionaj plantoj, ekzemple :

E-Jjuuni

New Cocoyam

Xanthosima mafafa, Xanthosoma sagittifolium.
Herbeca, tuberforma staŭdo kun grandaj folioj sagoformaj.

Tiuj listoj estu poste disdonitaj al studentoj kaj en elementaj lernejoj kiel scienca bazo por biologia studado.

En malplenajn benzinuojn, vicigitajn apud la seminari-oficejo, oni amasigis diversajn ŝtonojn el pluraj partoj de Afrolando. En 525 aliaj ujoj kreskis diversaj plantoj, ne nur lokaj, sed ankaŭ el Usono kaj Aŭstralio, ĉiu kun sia latinskribita etiketo.

La ekspertodomo kaj la elmontrosalono vere estis fascinaj. Ministroj kaj eminentuloj pri kamparana edukado venis de tre malproksime (Nov-Jorko, Lagoso, Kolombo) por vidi best-skeletojn, tabelojn montrantajn la vivociklon de tineo, diversajn specimenojn de herboj, elektrajn motorojn (inĝenie faritajn el fera najlo, kupra drato kaj razilklingo), reduktitajn modelojn de elektraj grupoj, kaj aliajn inventaĵojn, kiuj demonstris sciencajn principojn, kiel ekzemple la pesilo, la varmopropagado, la metaloksidigo. Bedaŭrinde por la Aba-studentoj tiuj salonoj estis nealireblaj.

Sur la tereno de la seminario ili tamen povis vidi serpent-fosaĵon (entenantan unu pitonon), fiŝbasenon, meteorologian stacion, arboĝardenon kaj serion de paneloj montrantaj la distancon rektlinian inter la seminario kaj Parizo, Sidnejo, Buenos-Ajreso...

Dum sia du kaj duonjara restado la eksperto diligente laboris kaj li kredis je sia laboro; sed al kiu **disvolvad-teorio** respondas tiu tuta aktivado?

11.4 Al la teorio, ke **disvastigo de sciencaj ideoj** kondukos al progreso.

En Afrolando laŭ tiu teorio mankas laborproponantoj dum abundas la laborserĉantoj.

Do disvolvado = multnombro de laborproponantoj. Al afrikano bedaŭrinde mankas ne nur entreprenemo, sed ankaŭ racia rigardo al la vivo. Lia scienca scio estas nula; li ne vidas ĉirkaŭ si ĉiujn riĉaĵojn de sia lando. Ĉar li ne konas la kalkŝtonon, li ne povas ekpensi pri cement-farado. Li ne scias, ke la ruĝfolia arbo kreskanta apud lia kabano estas eŭforbio, tre alte taksata en Eŭropo. Kvankam ne estas elektro-instalaĵoj en lia vilaĝo, se li povas lerni kiel fari motoron el najlo, kupra drato kaj razilklingo, li komencos kompreni la principon pri elektra kurento, kio eble estas eĉ pli grava. La sekvanta ekzemplo povas klarigi tiun teorion: Je kelkaj metroj de la fiŝbaseno troviĝis ligna breto, sur kiu staris sep grandaj potoj; ĉiu el ili entenis ĥemian solvaĵon. La unua poto enhavis "kompletan solvaĵon"; la dua, ĉion minus sulfuro; la tria, ĉion escepte de fero...kaj tiel plu.

En tiuj potoj maizo estis kreskonta; la celo estis montri, ke maizo pli bone kreskas el la kompleta solvaĵo, kaj malpli bone, se mankas iu el la diversaj elementoj.

(Kiel instrumetodo, ni agnosku, tio ĉi povas esti okulfrapa maniero montri, ke la plantoj bezonas nutraĵon. Povas esti, ke tio ĉi montras eĉ la valoron kaj la konsiston de ĥemia sterko.)

Jarojn poste, laŭ tiu teorio, iuj instruistoj memoros tiun demonstron kaj ripetos ĝin en sia elementa lernejo, supoze ke ili sukcesos akiri la necesajn potojn kaj ĥemiaĵojn eble 300 km for de la koncerna vendejo. La lernantoj estas impresataj; ili tuj vidas, ke la ĥemia sterko estas grava. Tion ili diras al siaj gepatroj, kiuj siavice kaptas tiun veraĵon kaj komencas uzi modernajn metodojn. Ili rikoltas pligrandkvante, ilia enspezo altiĝas: ek al disvolvado!

Plie la infanoj malkovras, ke valoras kultivi la grundon, se tiel belaj rikoltoj estas la rekompenco, kaj ili ne plu deziras foriri al grandaj urboj.

11.5 Tia prezentiĝas almenaŭ la teorio. Ĝi iel aspektas alloga. En ĝi estas nocioj pri intera teknologio, simplaj kaj imagoriĉaj metodoj. Ĝi ŝajnas praktika, ligita al agrikulturo kaj produktado, al la loka medio. Vizitantaj ekspertoj ŝajnas impresataj; kio do rajtigus nin kritiki?

Miaopinie ni havas ĉian rajton, ĉar tiu teorio subtak-
sas la sociajn realaĵojn priskribitajn en la antaŭaj ĉapitroj.

Ĝi estas bazita sur la nocio, ke subevoluo estas unuarange teknika problemo, solvebla per novaj teknikoj. Ĝi ne konsideras la lokajn ekonomiajn kondiĉojn, la malriĉecon, la superregadon ĉe la teplantejoj, la elfluon de la riĉaĵoj.

La plejmulto el Aba-farmistoj **sciis** pri sterko, herbodetruiiloj, insekticidoj. Se ili ne uzis ilin, estis pro tio, ke ili ne havis eblecon preni sur sin la riskon. Eĉ kun abunda rikolto ili entute dependis de la riĉaj kamionposedantoj por transporti siajn rikoltaĵojn ĝis la urbo. Se la farmistoj diskutus la de ili proponitan prezon, iliaj produktoj restus putrontaj sur la vojrandoj.

11.6 Sed la ĉefa kritiko koncernas **partoprenon**, aŭ pli ĝuste mankon de ĝi.

La projekto estis ellaborita de eksperto je miloj da kilometroj for de Aba-regiono. Ĝi estis "vendita" al la ministro pri edukado en Afrolando, kiel prestiĝan projekton, kiu allogus internaciajn ekspertojn el la tuta mondo. (Tio reale efektiviĝis, okaze de posttagmezaj vizitoj, ĉar Aba oportune situas proksime de la ĉefurbo kaj de ĝia internacia flughaveno).

Neniam oni konsultis la lokajn farmistojn; neniam oni invitis la instruistojn aŭ lernantojn kontribui al difino de la celoj, aŭ kritiki la instrumentojn. Vere tre brava estus la kamparano, kiu kuraĝus meti sian piedon sur la verdajn herbobedojn de la Seminario!

11.7 Ĉu povus okazi alimaniere? Ĉu iu estus povinta enkonduki programon pri kamparana edukado samtempe demokratane kaj favorane al Disvolvado?

Laŭ alicela konsidero tio ĉi supozeble povus realiĝi. Ĝi implicus rektan ligiĝon inter la edukplano kaj la regiona disvolvado-projekto (tiu lasta elpensita kaj aprobita de la loka popolo koncernata).

Oni devus eksterigi la Aba-lernejojn el la tradicia ekzamen-sistemo kaj ilin meti je la dispono de la tuta komunumo, kiel centrojn por amas-kampanjoj por alfabetigo, soci-, ekonomik- kaj disvolvado-studado.

La tuton vivigus kulturaj kaj sportaj programoj regionskalaj.

Pro tio, ke la popolo estas tiel malriĉa, oni devus depreni specialan imposton ĉe la teplantejoj kaj ĉe la riĉaj bienposedantoj por financi ne nur la eduk-programon sed ankaŭ la regionan disvolvado-projekton.

Ĉu tio ne ŝovus politikon en la edukadon? Kompren-eble jes! Politiko, edukado kaj disvolvado konsistigas unuecan tuton. Apartigu ilin kaj vi ricevas la bildon de Aba-projekto: mallarĝa reformo efikanta sur nura parteto de la programo.

Dank'al tiu reformo la infanoj en Aba konas nun la ordinaran "yam", kiel **herbecan tuberforman staŭdon!**

DISVOLVADO EN HEJMLANDO

12.1 Ŝajnas al mi neverŝajne, ke iu persono sukcesos helpi la disvolvadon en fremda lando, se li (aŭ ŝi) ignoras subevoluo en sia hejmlando.

Tamen ĉiujare pluraj miloj da eŭropanoj kaj nord-amerikanoj fermas la okulojn kontraŭ la ĉirkaŭa neegaleco kaj foriras transmaren.

Ili kompreneble scias, ke ekzistas malriĉa popolo en ilia propra lando, sed ili forpuŝas la malnovan diraĵon : "Interhelpo komenciĝu hejme" kaj argumen- tas, ke la malriĉuloj de la Tria Mondo eltenas multe pli malbonan pozicion (vere) kaj pro tio multe pli bezonas ilian kompetenton (malvere). Plejmulto el ili havas teorion por klarigi, kial ankoraŭ ekzistas malriĉeco apud prospero. Ĝi estas la argumento nomata cirklorezono, kiu remem-origas pri la **liberala vidpunkto** rilate al la Tria Mondo. Ili esprimiĝas tiele :

12.2 La teorio de malriĉeco-ciklo

“La homoj estas malriĉaj, ĉar ili vivas en malriĉeco-kulturo. Ili estas multmankaj, ĉar iliaj gepatroj estis nek energiaj, nek inteligentaj. Infanoj naskiĝintaj en nesufiĉe kulturita medio malsukcese laboras en la lernejo. Do ili ricevas la plej mizerajn okupojn, aŭ ne ricevas. Per siaj malaltaj kaj neregulaj salajroj ili povas havigi al si nur loĝejaĉojn, aŭ esti sen loĝejo, kiam ili ekkreas propran familion. Ili scias malmulte pri seksregado, naskas tro multajn infanojn, kiuj mizere kreskas en malpureco, apatio, nescio kaj malsukcese laboras en lernejo...”

La argumentado daŭras plu :

"Tiuj homoj jam ricevas gravan helpon de la bonfara ŝtato, kaj inter tiuj, kiuj ne sukcesas eliri el la malriĉeco-ciklo, la plejmulto reale eĉ ne provas. Ili apartenas al la homkategorio, en kiu oni ne plenumos honestan regulan laboron - certe tiom longe, kiom estos riceveblaj tiom da ŝtataj helpoj. Ricevinte pli komfortan loĝejon, ili nur bredus kolombojn en la ĉefa salono. Tiuj ĉi estas la **senmeri**-taj malriĉuloj kaj estas malmulto farinda por ilin helpi.

"Oni tamen povas forkonduki iliajn infanojn al infanhejmoj, kie oni taŭge nutros kaj prizorgos ilin. Se necese la loka instanco povas entute atribui al si la gepatrajn rajtojn, ĝis la infano estos 18-jara.

"Aliflanke estas malriĉuloj meritoplenaj, kiuj vere provas sin mem progresigi. Tiajn personojn oni povas identigi dank'al diversaj testoj fare de profesuloj. Sukcesinte ili povas ricevi diversajn helpojn. Oni povas reeduki ilin por speciala laboro, doni al ili vestaron por helpi ilin resti puraj kaj netaj, psikiatre flegi ilin, se iliaj problemoj rezultigas nervajn perturbojn.

"Dum periodoj de amasa senlaboreco la bonfara ŝtato ne lasas tiujn personojn malsatmorti, sed helpe provizas ilin abunde."

12.3 Alia metodo antaŭnelonge adoptita por rompi la tielnomatan malriĉeco-ciklon (metodo, kiu memorigas pri Aba-regiono kaj aliaj eksperimentoj, kies "ostoj" kuŝas blankiĝantaj sub la sunradioj en multaj afrikaj landoj) nomiĝas **Plibonigo-Areo**.

Maltrankvilaj pro la mizero de niaj domaĉoj - aŭ pli ĝuste pro la perforto, al kiu ĝi kondukas atingante la kvartalojn de la respektinda mezklaso - niaj registaroj decidis apliki hejme la teknikojn de Komunuma Disvolvado.

Urboparto estas selektita pro nesalubra stato, kiel areo bezonanta **urban helpon, ĝeneralan plibonigon aŭ edukan prioritaton**. Fiksitaj monsumoj estas uzataj por pagi la disvolvad-laboristojn, novajn klasĉambrojn en elementaj lernejoj, florbedojn modernan studmaterialon por "malrapidaj" infanoj*... Monsumoj iras al komunumaj centroj por disponigi tablotenison, kafon kaj hazardludilojn.

- 12.4 La principo, kiu gvidas tiun koncepton pri malriĉeco, estas jena : la kulpo kuŝas **interne** de la malriĉa popolo, aŭ en ĝia genetika heredaĵo, en ĝia psiko aŭ en ĝia kulturo.

Laŭ tiu teorio oni asertas ankaŭ, ke la institucioj de nia socio, lernejo, industrio, leĝo, sociaj servoj, unuigas por helpi tiun popolon kaj tiel redukti ĝenerale la maljustaĵojn.

- 12.5 Sajnas al mi strange, ke volontuloj povas foriri por helpi en la Tria Mondo kun tiu vidpunkto pri malriĉeco kiel gvidlinio. Ĉar, se ni pli grandskale aplikas tiun logikon al la Tria Mondo, du miliardoj da homoj tiam estas laŭdifine "neadaptitaj".

Sed ni havas alian, multe pli konvinkan klarigon pri malsukceso, pri malriĉeco en nia medio, kaj tiu ĉi vere povas esti globale aplikata.

Tio estas la teorio de **struktura malriĉeco**.

Kion ĝi signifas? Simple, ke nia socio kaj ĝiaj enaj institucioj estas organizitaj konkurmaniere tigrade, ke por certigi la sukceson de iuj, la aliaj...malsukcesu.

La plej evidenta ekzemplo kompreneble estas la konkur-sistemo ekonomia, en kiu la plej potencaj firmoj "voras" la malfortajn, kaptante ilian merkaton kaj ilian kvalifikitan personaron, senlaborigante la "superabundajn" dungitojn - ĉio ĉi por atingi

* ekz. la P.L.D.K "Peabody Language Development Kit", konstruita en Nashville, Tennessee; enkondukita en la projektojn de la Brita Komunumo en 1969-70. En si mem kolorplena, stimula lernprogramo, sed kritikita de la Britaj instruistoj pro ĝiaj usonismoj. Konsentite; tamen ĉu ili same kritikis la anglismojn disvastigitajn nome de edukado tra la tuta Tria Mondo?

pli altajn profitojn. Eĉ interne de la firmo tiu procezo pludaŭras : la estraro devigas la fakojn inter si konkuradi; la celo estas pere de raciigo elimini personojn, sektorojn aŭ eĉ kompletajn fakojn, se ili ne estas entute profitodonaj.

Sed ne nur en la industria, komerca kaj financa ĝangalo la malfortuloj pagas profite al la fortuloj, ĉar laŭ tiu teorio la modelo ripetiĝas interne de ĉiu okcidenta institucio eĉ en tiaj, kiaj Edukado kaj Sano*, kie supozeble oni alte taksas la homajn valorojn.

12.6 La lernejoj ĝenerale estas organizitaj laŭ maniero ankoraŭ pli malaktuala kaj pli hierarkia ol la socio entute. Same kiel en Aba-lernejoj ili disdonas akademian temojn en 45-minutaj "pakaĵoj" en same regema atmosfero de konkurado (aŭ de apatio, de malakcepto ĉe pli kaj pli multnombraj infanoj de la laborista klaso) kun la sama insistado havigi la "ĝustajn" respondojn. Kreemo kaj kritiko el la bazo estas ne bonvenaj.

La infanoj de la laborista klaso estas sisteme malfavo rataj je ĉiu grado de la lerneja organizo. La procento de deliktoj kaj lernejo-forlaso regule kreskas. Multaj instruistoj cinike konfesas : "Mi faras ĝin nur pro la longa libertempo" kaj promociiĝas en propra kariero nur antaŭenpuŝante siajn pli kapablajn lernantojn tra la ekzamenoj.

Infanoj estas senigitaj je la plezuro kaj la ekscitiĝo de reala lernado. La lastaj jaroj en lernejo - ankoraŭfoje tio aparte koncernas la infanojn de la laborista klaso - utilas nur por savi la infanojn el la stratoj. Dume se ni rigardas la personojn, kiuj tenas la povon, estroj de grandaj entreprenoj, leĝistoj, politikuloj, ŝtatoficistoj, instruistoj, militistoj, ni malkovras en ĉiu el tiuj grupoj inter 40 kaj 90% da ili, kiuj **neniam** vizitis ordinaran lernejon; ili vizitis multekostajn (kvankam helpatajn de la ŝtato) privatajn lernejojn. Kaj ili restas inter si ekslernantoj ligitaj per vere efika retamikaro.

Jen demokrata eduksistemo!

* Se mi ŝajnas tro akre kritiki la lernejojn kaj la hospitalojn, ne estas pro tio, ke mi opinias ilin la plej malbonaj el niaj institucioj sed tial, ke

a) mi spertis senperan kontakton kun ili trans la oceanoj kaj ankaŭ en Eŭropo.

b) mi estas influata de Ivan Illich.

12.7 Supozeble fundamenta estas la homa rajto pri bona sano kaj pri flegado en okazo de malsano, sed ĝi estas tre maljuste dividita inter riĉ- kaj malriĉuloj en nia socio. Ankoraŭfoje la malfortaj malriĉuloj pagas profite al la fortaj riĉuloj.

Klasika ekzemplo estas trovebla en verkaĵo de Titmuss, kiu pristudas la kolektadon de homa sango en Usono kaj en Eŭropo por la transfuzoservo. Li aparte klarigas, ke en Usono komercaj firmoj kolektas homan sangon pagante 5 dolorojn por duonlitro kaj vendas en hospitaloj la saman kvanton kontraŭ minimume 35 dolaroj. Multaj el la vere plej malriĉaj personoj donas sangon. Se ili ne posedas monon por unu manĝo aŭ por unu toksaĵuzo, ili nur iru ĝis la sang-provizejo de sia kvartalo...

Tiu sistemo estas danĝera por la sangdonantoj - multaj el ili suferas pro nutromanko kaj malsano - kaj ĝi ankaŭ kontaĝas hepatiton, kiu ofte mortigas la ricevintojn. Plie ĝi kaŭzas troabundon kaj malŝparon de la sango dum iuj periodoj, sekvataj de gravaj mankoj dum aliaj. Ĝi malaltigas la sciencan nivelon kaj enkondukas la profitsistemon en la elekton mem inter vivo kaj morto. Fine laŭ tiu sistemo, kiuj el la plej malaltaj socitavoloj donis propran sangon, tiuj malofte havas eblecon reaĉeti ĝin, se iam ili bezonas ĝin por mem saviĝi.

12.8 La sangotransfuzo prezentas nur unu aspekton de la Sanorganizo kompreneble sed estas publika sekreto, ke adekvataj kuracrimedoj en okcidenta socio (eĉ kun nacia plano pri Sano) utilas nur al la riĉuloj.

Niaj sanoservoj - tute maladekvataj sur la kampo de mensa sano - ripetas la subpremajn strukturojn tiel bone konatajn. La dudekjarcenta hierarkio kaj la emfazo pri statusoj, la mizeraj salajroj kaj longa labortempo de la servistaro, la kvazaŭ dieca prestiĝo de la kuracisto, la rajtomanko de paciento por informiĝi pri propra stato, la longaj atendovicoj, la specialaj aranĝoj kaj privataj ĉambroj por influhavaj personoj - ĉio ĉi montras la diversajn aspektojn de nedemokrata sistemo, en kiu privilegio, profito kaj paternalismo unuigas por humiligi la malfortulojn.


12.9 Koncerne **loĝdomojn** ripetiĝas la sama struktur-modelo.

Ĉar inflacio, bieno-spekulado kaj serĉado de rapida profito altigas la prezon de loĝejoj; kiuj (aŭ kies gepatroj) posedas propran bienon, tiuj povas plu akiri da ĝi; sed kiuj ne havas tian ŝancon, tiuj fariĝas pli kaj pli malfavorataj en la vivkonkurso. Dum la privilegiitoj aĉetas duan domon en Hispanio, la luntoj en popolaj kvartaloj alfrontas forpelon kaj senhejmiĝon; tiamaniere la posedantoj povas vendi al spekulistoj.

La **leĝaro** estas strukturita tiel, ke la riĉaj kaj influhavaj personoj senpune vivadas eĉ se kulpante pri gravaj deliktoj, kiaj ekzemple ega fraŭdo imposta, dum obskura ŝtelinto, kaptita de triumfanta bazar-detektivo kun kafskatoleto en sia poŝo, estas vokata antaŭ tribunalo kaj kondamnata al monpuno. Liaj (ŝiaj) nomo kaj adreso tiam aperas en la loka ĵurnalo.

Eĉ kiam ili kulpas pri similaj deliktoj, riĉulo kaj malriĉulo eltenas rimarkeble malsamajn punojn: la pli pezaj iras la malriĉulo kaj ĉi tiu pli ofte estas malliberigata. Kaj elirinte el prizono oni malfacile trovas aŭ konservas sian laboron.

12.10 Fine pri kio temas? Temas pri strukturo, kun kiu ni mem familiariĝas :



Transŝovo de riĉaĵo; daŭra pagado de la pli malriĉaj favore al la pli riĉaj. Kaj en la suba parto de la piramido ni havas la amason, forpelitan de la regpovoj, venkitan de la sistemo, en kiu "malriĉeco estas krimo". (Tion agnoskis eĉ Disraeli, konservativa ĉefministro!).

Jen do la teorio pri **struktura malriĉeco**, kiu klarigas subevoluon kaj malriĉecon en nia socio.

12.11 Kiu vidpunkto plej proksimiĝas al la realo? Ĉiu persono faru sian propran opinion pri tio - same kiel pri la kaŭzoj de malriĉeco en la Tria Mondo. Se li decidiĝas favore al la vidpunkto "Malriĉeco-

ciklo" - t.e. ke la kaŭzo kuŝas en la "netaŭga" popolo mem - nia disvolvad-helpanto certe estos ne sola. Cetere ĝi estas la oficiala vidpunkto kaj multaj diversaj laboreblecoj prezentiĝas antaŭ li. Li povas eniri oficejon pri Socia Asekuro kaj doni monon al la malriĉuloj ekzamenante la ricev-itajn helpopetojn, kontrolante, ĉu ili estas pravig-itaj, kaj persekutante tiujn, kiuj ricevas pli ol la leĝo permesas, ekzemple tiujn patriniĝintajn fraŭlinojn, kiuj kun siaj infanoj kaŝe dividas sian loĝejon kun plenkreska viro.

Li povas eniri la Sociajn Servojn kiel socia laboristo aplikante la konversad-teknikojn al sociaj kazoj, ekz. al familioj baldaŭ disiĝontaj (ofte pro financa kialo), al mensmalsanuloj, kaj al senhejmaj personoj. Li pene laboros kaj de tempo al tempo demandos sin, kial la klientofluro ŝajnas neniam malpliigi. Li povas fariĝi funkciulo pri Kontrolata Libereco, socia asistanto pri Edukado, aŭ eniri la Prizonservon. Ĉiuj tiuj branĉoj de la Bonfara Ŝtato, kaj multaj pliaj, proponas karieron al la junulo, kiu volas labori por la "sociaj neadaptitoj".

Verdire li povas esti ankaŭ Entreprenestro, kiu kun trankvila konscienco iam donacas monon al Bonfaraj Asocioj kaj monludas ĉe la borso la sekv-antan tagon. Por li tiuj du sintenoj ne kontraŭas unu la alian.

Aŭ li povas decidi, ke en lia hejmlando la mizero ne estas ekscesa. Kun persistemo kaj helpate de konatoj li sukcesos eniri en la internacian civilan oficistaron kunigante la senton, ke li helpas la malriĉulojn en la mondo kaj la statuson, salajron kaj avantaĝojn certigantajn al li personajn komforton kaj sekurecon.

12.12 Sed se vi elektas la alian vidpunkton, t.e. ke la kulpo kuŝas en la **strukturo** kaj ne en la popolo, kiamaniere vi ekagos?

Estas tro facile diri : "Ni ŝanĝu ĉion. Ni komencu revolucion."

Por esti konvinka revoluciulo oni kapablu montri al la popolo, ne nur ke ĝiaj nunaj vivkondiĉoj estas maljustaj, kaj kial, sed ankaŭ demonstri, ke eblas vivi alimaniere kaj pli bone. Tio signifas penigan laboron kaj survoje ankaŭ ni devos ŝanĝi

nin mem.

Unue esti disvolvad-helpanto en nia socio ŝajnas al mi tute ne akordigebla kun akcipoŝedo aŭ eĉ dungiteco en iu proŝitdona entrepreno privata. Malfacile aŭ ne, oni devas apartiĝi de la ekonomiaj estigantoj de struktura malriĉigo. La restado en tia entrepreno povus praviĝi nur kiel manovro por fine atingi regadon fare de la laboristoj. Oni ankaŭ povas poŝedi akciojn nur por akiri rigardon sur la borsajn operaciojn de la kompanio kaj voĉdonon dum la ĉiujara ĝenerala kunveno.

Sed kiel do akiri nian buterpanon?

Kutima dilemo ŝajnas esti la elekto inter laboro en oficiala institucio, kiel instruado aŭ loka administracio, servado al klientoj kun eĉ ŝanco igi ilin pli radikalaj kaj pli kritikemaj, sed ĉiam kun la danĝero fari kompromison kaj akcepti la avantaĝojn de la sistemo

- kaj

fuĝo el la strukturoj, kiuj certigas sekuran karieron - aliĝante al kolektivo, al radikala teatro-grupo aŭ al komunumo por sunenergio - ekstere de oficiala kontrolo, sed kun la danĝero aktivi en fermita cirklo, esti izolita kaj forpelita de ambaŭ klasoj burĝa kaj laborista. Se oni sincere laboras por pli justa popol-partopreno en la povo, mi kredas, ke tiu elekto ne estigas dilemon. Elektu unu, aŭ la alian. Vi eble baldaŭ konscios, ke vi faras ambaŭ.

12.13 La unua paŝo konsistas en honesta rigardo al nia socio por distingi en ĝi la fortulojn disde la malfortuloj, konfesante ke subevoluo estas procezo konstante apartiganta la efikulojn, la ekspertojn, la parollertulojn, la informitojn, la rilathavantojn, la profesiulojn, la blankhaŭtulojn, la virojn, la plenkreskulojn... de la malefikuloj, la nekonkurpovaj, la soleculoj, la mallertuloj, la maljunuloj, la klientoj, la virinoj, la infanoj, la nigrhaŭtuloj.

Ĉi tiujn sisteme malfavoratajn ni devas subteni. Kie ni komencu? Kie ni estas - ĉe la laboro, la lernejo, la hejmo. Pristudu iun ajn el tiuj institucioj kiel povostrukturon kaj tuj aperos modeloj pri superregado. La privilegiuloj nature aranĝas certan nombron da fasadoj, defendmitoj por pravigi la maljustaĵojn. Ĉi tiujn ni devas esplori kaj elmontri.

Eĉ en komunumo aŭ volontula asocio privilegio povas disvolviĝi. Tiaj problemoj ne ĉesas pro tio, ke oni decidis sperti la kolektivan vivstilon. La membroj, kiuj pli facile kaj pli multe parolas, eble komencas superregi la aliajn per la nura flueco de sia konversacio. Oni ofte ŝarĝas la virinojn tute nature per la malpuraj kaj tedaj taskoj. Kiom da viroj propagandas por justeco en nia socio kaj tamen ekspluatas virinojn en sia ĉiutaga vivo! Male de bonfaro, Disvolvado - la demokratigo de la homaj rilatoj - **devus** komenciĝi hejme.

12.14 Sed la sekvanta paŝo kompreneble konsistas en laboro por disvolvado interne de pli grandaj strukturoj en nia socio.

Se oni analizas la celojn, la metodojn kaj la internan demokratecon de iu organizo, oni ne povas pluvivi sola. La bezonata esploragado postulas **grupan strebadon**.

La demandoj skizitaj en la 6a kaj 7a ĉapitroj ĉi tie ankoraŭ valoras egale. Ankaŭ la grupo demandas: Ĉu tiu institucio laboras por pli justa partopreno en la povo, kaj ĉu ĝi praktikas, kion ĝi predikas? Kolektu sisteme faktojn, informojn kaj vi baldaŭ malkovros, ke la kolektiva materialo estas danĝera kiel dinamito - danĝera por kiuj posedas la regpovon. Ĉar tiuj povotenantoj estas ne tiel bone informitaj, kiel ili pretendas.

Estas grandega bezono pri alispeca serĉado, kritikema serĉado. La nuna serĉado plifortigas la estrojn, la teknokratojn, la fortulojn. Ni bezonas serĉadon, kiu plifortigos la estratojn, la manipulatojn.

Grupo estas bezonata ankaŭ por formuli la celojn, la bildon de la socio, kiun vi volas konstrui.

Fine vi bezonas grupon por subteni vin. Se vi estas malcedema, vi tuj aŭ poste, sed certe, iam frontos kontraŭ la establita regpovo:

- en ĝia **kultura** formo : "Ĉesu skui la boaton. Via sinteno estas neprofesia, senrespondeca, nematurula. Niaj ciferoj montras, ke viaj informoj estas eraraj. Ne, vi ne rajtas konsulti la arkivojn. Vi fidu nian parolon."

- en ĝia **ekonomia** formo : "Kun bedaŭro la Estraro informas vin, ke via servado ne plu estos bezonata post vendredo."

- en ĝia **fizika** formo : "Malpermesate disdoni flugfoliojn en tiu loko. Vi estas arestita, venu kun ni al la policejo. Eniru tiun veturilon, kaj silentu."

12.15 Tio povas soni tro dramece, sed mi kredas, ke tiuj organizoj evitantaj la konfrontadon kun la povotenantoj, fierantaj pri sia simpla laborplenumado, malutilas al disvolvado.

Ĉar ĉiuj signoj indikas al ni, ke la elito reganta super nia socio kondukas nin al ruiniĝo. Hodiaŭ la laŭdire avangarda mondo frontas kontraŭ gravegaj krizoj : pri energio, krudmaterialo, urbaj domaĉaroj, nuklea polucio. Kaj la vastaj organizoj, la supercentralizitaj burokrataroj, kiuj kreis tiujn krizojn, nun montriĝas nekapablaj ilin regi. Spite al (aŭ pro) ega povokoncentrado, la magio de moderna teknologio, la komputerigado, tiuj plumpaj organoj ne kapablas realigi komunikadon simplan, dudirektan kaj demokratian. La decidloko fariĝas pli kaj pli alta, pli kaj pli malproksima.

Ĉar tiuj krizoj frapas nin kaj ĝenas nian komforton, pli kaj pli minacas nin fortega rebato de superregado. Nia tre laŭdata toleremo povas aspekti nur supraĵa, se ondo da naciisma sento leviĝas kontraŭ la tradiciaj propekaj kaproj : "Judoj, enmigrintoj, nigruloj, socialistoj, samseksemuloj..." kaj kontraŭ la Tria Mondo.

12.16 Neniu organizo, kiu pretendas helpi al Disvolvado, povas resti blinda pri tiuj tendencoj.


Kiu ajn estu ĝia specifeco - ekz. handikapitoj, senlaboruloj, senhejmaj familioj, frapataj edzinoj, toksigemuloj, ludterenoj - iu organizo malsukcesas, se ĝi ne kapablas rilatigi sian propran specialaĵon al la globala situacio.

Ekzemple, ne sufiĉas helpi senhejmajn familiojn trovi ŝirmejon. En la procezo - kaj mi konsentas, ke tio povas esti tre malfacila, kiam la tempo mankas kaj la afero urĝas - ni transformu la dilemon de tiaj familioj "el privata problemo al publika demando" antaŭ ĉio en ilia propra spirito. Ili komencu demandi : "Kial ni estas senhejmaj? Kial ni estas senlaboraj? kaj necesas helpi ilin malkovri la respondojn laŭ povoskemo.

Tiu demandado, kondukanta al konfrontado, dum kiu la plej malaltaj tavoloj de la socia hierarkio

lernas demandi pri sia situacio laŭ maljusta povo-partopreno, jen la signo, kiu ebligas distingi disvolv-adprogramon disde bonfara asocio.

- 12.17 Aludante lastan fojon pri nia modelo : monda disvolvado fariĝos ebla, se, kaj kiam, la popoloj P1 kaj P2 komencos kompreni, ke ili havas pli da komunaj interesoj inter si ol kun siaj propraj elitoj E1 kaj E2.



12.18

Tiu globala distribuado de la povo kondukas nin, paŝon post paŝo, elekton post elekto, al socialisma socio, nenio malpli. Kiel gvidilon por fari tiujn elektojn, ni povas mencii la sekvantajn principojn:

"...homoj prefere al maŝinoj, popolo al registaro, praktiko al teorio, studento al instruisto, kamparo al urbo, eteco al egeco, tuteco al aparteco, io organika al io sinteza, plantoj al bestoj, metisperto al eksperto, kvalito al kvanto..." kaj mi aldonus, **demandoj al respondoj.**

Miaopinie helpi al Disvolvado signifas fari tiajn elektojn hejme aŭ transmare. Ĝi signifas defii la homojn, kiuj malagnoskas tiujn prioritatojn. Ĝi signifas sin engaĝi, kaj en tiu ludo neniu estas spektanto.